


esperanto




APRILIO 1992 • 85-A JARO • N-RO 1036 (4)

ISSN 0014-0635



Kiu murdis Mozart?



Zamenhofs verkaro:
ĉu kompletigita?

Esploroj kaj enketoj

- 61 Estrarkunsido: Rekordoj foje donas zorgojn
- 62 Regiona kaj landa agado: Bjelorusio: veterano kaj nova elano (Leonarda Volkova); Kultura kreskego en Alp-Adrio (Zlatko Tišljari); Financaj baroj en Latin-Amériko (Maritza Gutiérrez); Vidbende kaj voĉlege en Kubo (Orlando Raola González)
- 64 Kiu murdis Mozart? (Seán Osborne)
- 66 Enketo: Nijaj membroj respondas pri UEA kaj pri si mem (Nikola Rašić)
- 69 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 70 Lingvo: Pri la bona, tute ne komleta Esperanto (Fernando de Diego); Ni restigu Esperanton esperanteca (Liu Xiaojun); Pri interlingvistaj lingvokonoj (W. A. Verloren van Themaat)
- 73 Libroservo: Beletro pli popularis
Novaj Komitatanoj B 1992/95
- 74 Recenzoj: *Mejdnarodnye vspomogatel'nye jazyki* (Detlev Blanke); *Ermitoj kuncelebris la majstron* (Rikardo Ŝulko); *De Mickieviĉ al Goethe, De Molière al Šalom-Alejĥem, De Moseo al Andersen* (Nikolai Lozgaĉev)
- 77 Foliame (pripresajaj raportetoj)
- 78 Reagoj: El abismo (Antonina Apollo); Ni bezonas pacmovadon sed ne MEM (Bojidar Popoviĉ); Ni bezonas nek MEM nek pacmovadon (Alexander Karkovsky); Glosa al Voso (Giorgio Silfer); Ni ŝanĝu nin mem! (German Pirirot); Ni kreu alternativetojn! (Garvan Makaj); Miksitaj magiaĵoj (W. F. Huppertz)
Enkonduko al la Manifesto de Raŭmo
- 79 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 80 Oficiala informilo; Anoncetoj

Vi trovos

ke ni ne forgesis la 75-jaran datrevenon de la morto de Ludoviko. Ni rememoras lin fakte per omaĝo al Ludovikito, la japano Itō Kanzi, kies giganta eldonplano "iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof" ĵus atingis sian lastan kajeron (p. 74-76.). Ni apenaŭ kredas ke tiu nelacigebla "ermito" volus nun ekriprozi. Pro li ni dediĉis ĉi-numere kvar paĝojn al libroj kaj recenzoj (lasu Vin influi de nia furor-listo sur p. 73!), kvankam Vi ne tro ŝatas tiun ĉi temon... sed des pli volonte vi legas pri la Lingvo, ĉu ne? (artikoloj sur p. 70-72). Kiel ni scias tion? El la enketo inter niaj legantoj (p. 66-68), kies 866 responddintoj subigis al la analiza lupeo de Nikola Rašić. Kaj enketis por ni ankaŭ la fekund-pluma Seán Osborne, pri la murdo-kazo (?) de Wolfgang Amadeus Mozart (p. 64-65.). Tamen, ne havu misan impreson pri krimememo en nia ĉi-jara kongreslando...

La kovrilo: En Dresdeno Doris Stock desegnis la lastan portreton de Mozart (1789), kaj samloke Lehmann-Dumont bildigis Zamenhof (1908). Ankaŭ Vieno estis unu el la scenejoj por la vivo de ili ambaŭ.

esperanto

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en konsultaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M. P. Berthelot (1882-1910); **establiĝita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 115 landoj.
Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: István Ertl.
Abonprezo: varias laŭlande (gld. 55,12; US\$ 27; GM 48; enoj 3960; ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-suba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 5,00 guldenojn.
Anonclarifo (gld.): 1 p. 1760, 1/2 p. 970, 1/4 p. 540, 1/8 p. 300, 1/16 p. 170. Movada rabato 50%. Eksterakviritaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tujaj ripetoj 20%.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +3110 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telefaks: +3110 436 17 51.

Teleks: 23721 uea nl.

Telegramo: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (ĝirficejo Den Haag).

Ĝenerala Direktoro: Simo Milojeviĉ.

Direktoro de la CO: Osmo Buller.

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigado, planado): prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London, Britio SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefaks (071) 383 4108.

Vicprezidanto (regiona agado, turismo, Fondumo Zamenhof): s-ro Roman Dobrzyński, u. Majdarska 13 m 91, PL-04-088 Warszawa, Pollando; tel. (22) 10 35 05.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj, esperantologio): d-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, D-W-5000 Köln 80, FR Germanio; tel. (0221) 680 32 50.

Ĝenerala Sekretario: s-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, London W4 5DR, Britio; tel. (081) 995 6244; teleks 8959991 coward g; telefaks (071) 726 8561.

Estrarano (informado): s-ro Ivo Durwaal, Paul Gilsonlaan 5, B-2650 Edegem, Belgio; tel. (03) 440 30 92.

Estrarano (financo, ĵurnalaro): s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Estrarano (landaj kaj fakaj asocioj): s-ro Oszkár Princz, Sallai u. 4. II/3, H-1136 Budapest, Hungario; tel. (HEA) (1) 15 60 244.

Estrarano (azia agado, aplikado en scienco): prof. d-ro So Gilsu, Yangchon PO Kesto 11, Seoul - 158-60, Korea Respubliko; tel. kaj telefaks (02) 646 5413.

Estrarano (kulturo): s-ino Spomenka Stimec, Nova Ves 87, CRO-41000 Zagreb, Kroatio; tel. (041) 42 92 51; telefaks (041) 42 12 94.

Observanto (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj [ILEI]): s-ro Stefan MacGill, Esó u. 7 III, H-1034 Budapest, Hungario; telefon-mesaĝoj kaj telefaks per HEA, (1) 15 60 244.

Observanto (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo [TEJO]): f-ino Saskia Idzerda, Bruchwiesenanlage 4 ZI. 801.4, D-W-6602 Dudweiler, Germanio; tel. (06897) 765402.

Estrarkunsido:

Rekordoj foje donas zorgojn

De la 27-a ĝis 29-a de marto okazis en Roterdamo iasence la lasta kunsido de la Estraro de UEA en ties nuna konsisto. Ĝi ja ankoraŭ kunvenos komence de la Kongreso en Vieno, sed nur por kelkaj horoj kaj nur por trakti kongresajn urĝaĵojn, antaŭ ol la Komitato tie elektos novan teamon por la venontaj tri jaroj. Ĉeestis ĉiuj 9 estraranoj, kvankam en la komenco ne mankis drameco. Ne kaŭzis ĝin So Gilsu, kiu alflugis el Seulo, nek Spomenka Štrimec, kiu inter Zagrebo kaj Roterdamo devis vojaĝi per buso, do aviadiloj kaj trajno. Ian Jackson, kiu normale devus flugi unu horon el Londono, venis rekte de sia profesia vojaĝo el Novjorko kaj – lia flugo malfruis 8 horojn.


Kvankam la Estraro en ĉi tiu periodo de la jaro devas trakti kelkajn ampleksajn tagorderojn, kiel: Spozkonto, Bilanco kaj Estrara Raporto pri 1991, tiuj eroj tamen ne ĉefrolis en la kunsido, i.a. pro la fakto ke la spezoj de la pasinta jaro saldiĝis kiel buĝetite, dum la bilanco montris kreskon de la asocia havaĵo, malgraŭ la prudenta komitata decido malaltigi la bilancan valoron de la Domo en Roterdamo. Kio do okupis la ĉefatenton de la Estraro? Jen kelkaj pli diskutitaj temoj:

La pasinta jaro finiĝis per rekorda nombro de individuaj membroj (8071 en 114 landoj). La kotizaj enspezoj tamen apenaŭ kreskis, ĉar novaj membroj venis el landoj kun la plej malaltaj kotizoj. Aliflanke, ankaŭ tiuj malaltaj kotizoj montriĝas altaj kaj nepageblaj precipe en la landoj de orienta Eŭropo.

La Estraro dediĉis apartan atenton al diversaj movadaj perturboj, kiuj okazas en kelkaj landoj. En Argentino, Kroatio, Ruslando kaj Ukrainio kreiĝis novaj "landaj asocioj", kiuj kontraŭagas la ĝisnunajn landajn organizaĵojn sub la preteksto ke "konkurenco estas sana". Jes, ĝi estas, sed kunlaboro kaj unueco estas pli sanaj. Similaj perturboj okazis pli

frue en Brazilo kaj Meksiko, sed tie jam venkis kunlaboro. Aliflanke, eĉ la ĉi-jara Kongreso en Vieno ne sukcesas venki la multjaran organizon diserigitecon de la movado en Aŭstrio, nek estas grandaj esperoj, ke la venontjara kongreso multe helpos al la unueco de la esperantistaro en Hispanio.

Pluraj nunaj estraranoj ne intencas rekandidati en Vieno. Tio ne malhelpis ke la Estraro dediĉu multan tempon al ideoj restrukturigi la estontan estraran laboron kaj efikigi la rolon de la Komitato. Oni aparte emfazis la gravecon de tio ke la nova



Post dek kvin seninterrompaj jaroj en la Estraro, Grégoire Maertens ne rekandidatos en Vieno.

estraro estu harmonia teamo, kio cetere estis la kazo de la ĝisnuna. Estus preferinde havi nur sep estraranojn, i.a. pro la financaj aspektoj. Necesas identigi la agadkampojn kiuj ricevu nepran atenton dum la venonta mandato; unu el tiaj kampoj

devus esti la problemaro de la movado en orienta Eŭropo. Regas ĝenerala konsento ke estraranoj devas vastasence bone orientiĝi pri ĉiuj movadaj demandoj. Necesas insisti ke al C-komitataneco elektrigu veraj spertuloj kaj fakuloj, kiel preskribas la Statuto, kiu cetere ne devigas al elekto de la maksimuma nombro de komitatoj C. Tiu lasta rimarko aparte gravas pro tio ke la Komitato jam fariĝas tro granda. Ni esperu ke pri ĉio ĉi pensos ankaŭ la Elektro-Komisiono.

La Kongreso en Vieno ricevis seriozan atenton de la Estraro. Ne pri la diversaj detaloj de la programo, kiel antaŭe okazis, sed pri la financaj perspektivoj. Ankaŭ ĉi tie ripetigatas tiu fenomeno kiu igas la monsumon de la membrokotizoj stagni, dum la membraro mem grave kreskas. El pli ol 2400 aliĝintoj al Vieno, en la momento kiam ni skribas ĉi tion, pli ol 1000 estas el la landoj kun financaj problemoj, kaj ili do pagas duonon de la baza kongreskotizo. Aliaj centoj da aliĝintoj estas gejunuloj, handikapuloj, komitatoj, kunuloj, infanoj ktp., kaj aliĝas aŭ senpage aŭ kontraŭ duona kotizo. Granda kongresanaro postulas grandan – kaj multekostan! – kongresejon, sed granda mono ne enfluas la kongresan kason. Ni nun timas ke la 77-a UK en Vieno superos 3000 kongresanojn kaj tamen produktos negativan saldon. Ĉio ĉi devigas al altigo de la kongreskotizoj por la venontaj jaroj, des pli ke ili restis samaj ekde 1990.

Inter la aliaj temoj kiuj okupis la Estraron, ni menciui la decidon baldaŭ modernigi la komputilan sistemon de UEA, tiel ke ĝi kontentigu la bezonojn dum la venontaj 10 jaroj kaj estu ligebla al kiu ajn alia komputilo. ★

Bjelorusio: veterano kaj nova elano

Entute 120 geesperantistoj el 25 urboj de eks-sovetuniaj respublikoj kaj Pollando kolektiĝis decembre en la urbo Grodno (Bjelorusio) por festi Zamenhof-tagojn. Inter la gastoj ĉeestis la fama pola E-pedago Ewa Bondar kaj la 90-jarojn aĝa bjelorusa veterano Miĥail P. Mandrik. La 15-an de decembro estis pendigita memortabulo sur la domon kie de 1893 ĝis 1897 loĝis kaj kiel okulisto laboris Zamenhof, redaktante la revuon "Esperantisto".

La 8-9-an de februaro alia E-renkontiĝo okazis en Minsko, la ĉefurbo de Bjelorusio, por celebri la 90-an naskiĝtagon de Miĥail P. Mandrik. La rave juna jubileanto ĉarmis la ĉeestantojn per ŝercoj, per deklamado de siaj versajtoj kaj per siaj belegaj pentraĵoj. Multaj esperantistoj dum aŭkcio akiris la bjelorusajn pejzaĝojn de tiu ĉi neordinara homo, kiu esperantistiĝis en 1921. Lia frato jam de 1904 korespondis kun la aŭtoro de Espe-

ranto. Loĝante en Moskvo dum la 30-aj jaroj, Miĥail Mandrik aktivis en la movado, ĝis en 1936 li estis senkulpe arestita. Kvin jaroj de koncentrejo... Tri jaroj kaj duono post la pikdrato dum militkaptiteco... *Amara vivo* nomiĝas la libro de liaj rememoroj aperontaj ĉi-jare. Post naŭ jaroj da suferoj li apenaŭ trovis la familion. Ekde 1958 Mandrik denove partoprenas la Esperanto-movadon: li prezidis klubon, gvidis kurson, eldonis lernolibrojn. Dank' al korespond-amiko novzelanda, li jam 26 jarojn estas membro de UEA.

La bjelorusa Esperanto-movado havas sufiĉe riĉan historion. Dum la dudekaj jaroj ĝi progresis kiel la plej forta en Sovetunio. Ni havas proprajn poetojn, kantistojn, lingvistojn, veteranojn, kaj adeptojn inter la junularo – bonan rezervon por fortigi la movadon. Oni planas eldoni ĉi-jare la bjelorusan lernolibron de A. Pavlukovec.

Nun la unuavica tasko de la bjelorusaj esperantistoj estas fondi Bjelorusan Esperanto-Asociacion. Post diskutoj dum la menciitaj aranĝoj, estis decidite fondi BEA-n kun centro en la urbo Grodno, kie iam loĝis Zamenhof kaj kie agadis la E-klubo *Espero* dum la lastaj du jaroj. Gravaj taskoj staras antaŭ ni:

1. Pere de komerca kaj turisma agado de esperantistoj kolekti monon, kaj aĉeti la domon kie loĝis Zamenhof, por rekonstrui ĝin kiel bazon por plua agado.

2. Fondi bjelorusan E-centron en la Zamenhof-domo, kun biblioteko kaj muzeo.

3. Produkti la vortarojn bjelorusa-Esperanto kaj Esperanto-bjelorusa.

4. Akceptigi Esperanton kiel fakultativan lern-objekton.

5. Fondi turisman E-sekcion ĉe la Fonduso de Bjelorusa Kulturo, por konigi al eksterlandaj esperantistoj la urbon kie loĝis Zamenhof, kaj ĝenerale la bjelorusajn kulturon kaj historion.

6. Fondi komercajn entreprenojn kaj firmaojn kiu uzos Esperanton kiel laborlingvon.

Leonarda Volkova (Bjelorusio)

Kultura kreskego en Alp-Adrio

Multaj el vi verŝajne ne scias kie estas tiu Alp-Adria regiono. Mi klarigu: ĝi estas teritorio ampleksanta nordan Italion, preskaŭ la tutan Aŭstrion, Bavaron, Slovenion, Kroacion kaj okcidentan Hungaron, inter kiuj ekzistas tradicie vigla kunlaboro interregiona en diversaj kampoj. Oficialaj prezidantoj de la regionoj (nun ankaŭ de kelkaj ŝtatoj) kunordigas la kunlabor-iniciatojn. Sed kio plej multe okulfrapas, estas la fakto ke en la regiono, kies ekstremaj punktoj malproksimas unu de la alia ne pli ol 500 kilometroj, oni parolas kvin oficialajn lingvojn apartenantajn al kvar lingvo-familioj. Kaj tio troviĝas meze de Eŭropo! De Maribor (slovena lingvo) al Graz (germana) estas nur 60 km-oj, al Zagrebo (kroata) nur 100 km-oj, al Zalaegerszeg (hungara) 120 kaj al Triesto (itala) 240. Aŭte vi povas en unu tago viziti ĉiujn tiujn urbojn, kaj vi devos renkonti

kvin diversajn lingvojn!

Analizante la nunan Esperanto-movadon en tiu ĉi regiono, ni povas konstati ke ĝi estas pli riĉa je kulturagado ol iu ajn regiono. En Zagrebo, la urbo de Internacia Kultura Servo (Amruŝeva 5, 41000 Zagreb, Kroatio), jam 25 jarojn okazas la Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) kun profesiaj pupteatroj, en Klagenfurt nun komenciĝos nova serio per la Unua Klagenfurta Pupteatra Festivalo, ankaŭ uzanta Esperanton (1-5 aŭgusto). Hungaroj havas alte evoluantan teatran E-kulturon, aron da teatraj profesiaj kapablaj uzi E-on, filmojn en Esperanto, eldonejojn. Gorizia (Italio) okupiĝas pri seriozaj pentro-ekspozicioj uzante la peradon de esperantistoj. En Maribor nun fondiĝis nova profesia kulturcentro Interkultur (Kočevarjeva 12, 62000 Maribor, Slovenio, faks. 38-62-29-798), kiu agados simile al IKS en Zagrebo. La organizaĵo de alp-adria

esperantistoj iniciatis konferencojn de E-tradukistoj en Ravne (Slovenio) kaj Festivalon de monodramoj en Maribor. Aperas novaj projektoj rilate la interŝanĝon de literaturaj, radio-dramoj ks. El Klagenfurt venas al ni nova projekto pri *Academia Operosorum*, internacia akademio por katolikoj, kiu uzos ankaŭ Esperanton kiel laborlingvon. Se oni aldonas ke ĉi-jare tiu ĉi regiono gastigas ankaŭ du grandegajn E-kongresojn: la Eŭropan en Verono kaj la Universalan en Vieno (dum la 4-a Alp-Adria Konferenco mem okazis ekster la regiono, en Poprad, Slovakio), la bildo de la Esperanto-kulturo ĝuebla en la alp-adria regiono estas sufiĉe kompleta.

Ĉu ne ŝajnas ke ĉi tie ĝermas io freŝa kaj nova, malgraŭ la teruro de la milito tuŝanta la randojn de ĉi tiu regiono? La regiono Alp-Adria bone konas la lingvan problemon. Eble ĝi nun pli rapide maturiĝas por kompreni ke ekzistas Esperanto.

Zlatko Tišljar (Slovenio)

Financaj baroj en Latin-Ameriko

La artikolo de UEA-estrarano Oszkár Princz pri *Strategio por landaj asocioj* (nov. 1991) estas vere interesa, sed ofte tro fremda al ni, loĝantoj de la t.n. tria mondo. Estas vero ke Esperanto efike funkciadas por internaciaj kontaktoj, sed por ni tiu motivo ne konsistigas realan argumenton por nia esperantismo. Kiom da esperantistoj jam pli ol du jarojn okupiĝas pri la Internacia Lingvo sen internaciaj kontaktoj? Estus interese sociologie esplori pri tiu fenomeno ĉi-hemisfere, precipe en Centra kaj Suda Ameriko. Same realas ke pli da tiaj kontaktoj multe riĉigos niajn landajn asociojn.

Ni konscias ankaŭ pri la oftega malŝparo de niaj fortoj, sed financaj baroj ne ebligas produktadon de ĉiusepacaj materialoj por internacie komuna uzado. Mi opinias ke mialande, en Kubo, oni de pluraj jaroj produktas sufiĉe altnivelajn instru-materialojn por propraj rimedoj homaj kaj materialaj. En Latin-Ameriko ekzistas forta homa potencialo kapabla atingi verajn sukcesojn sur tiu agadkampo, sed kiel konkretigi interregionan kunlaboron tiucele? Kiel ŝpari homajn rimedojn sen mono? Klopodoj tiucelej ne mankas: mi spertis en 1988 seriozan proponon de brazilanoj, meksikanoj, kolombianoj kaj ni, kubanoj, kadre de internacia konferenco *Esperanto '88* en Havano: komune re-eldoni la revuon *Esperanto* por nia anaro ĉi-kontinente. Tamen, la projekto tute fiaskis pro manko de mono.

Kiel trovi decan solvon al tiu situacio? Aliflanke, kiel produkti valorojn, vortarojn por ĉiuj lingvoj, se nia mono apenaŭ sufiĉas por malgrandkvante eldoni niajn instru-materialojn? Kiel starigi efikan distribuon reton? Fakte, multaj demandoj levigas survoje al komuna agado por landaj asocioj ĉi-flanke de Atlantiko. Mi mem pretas iel kontribui, se nia supera gvidas instanco antaŭvidas ireblan solvo-vojon.

Maritza Gutiérrez (Kubo)

La UK en Havano pasis... sed la informada semo falis sur sekundan grundon (de maldekstre: KEA-vicprezidanto A. Fernández-Calienes; la aŭtoro; verkisto I. Balenović el Jugoslavio).



Vidbende kaj voĉlege en Kubo

Oni povas jam paroli pri tradicio (plej ŝatata temo por maturiĝanta komunumo): la kubaj esperantistoj tute ne preteratentis la plej gravan eventon nialandan rilate al libroj kaj eldonado, kiu okazas ĉiun duan jaron: la Havanan Internacian Librofoiron. Kuba Esperanto-Asocio (KEA) ankoraŭfoje plezure respondecis informi la partoprenantojn pri la Internacia Lingvo kaj ĝia movado.

Ĉi-foje la Esperanto-budo estis iom pli alloga kaj pli bone ekipita ol antaŭe. La tutan tempon la vizitantoj povis spekti vidbendojn pri/en Esperanto; aperis sur la bretoj multaj el la libroj akiritaj de la Asocio danke al la 75-a Universala Kongreso kaj ĝia giganta libroservo, kaj la nova inform-folio pri Esperanto en la hispana disdoniĝis en kelkmila kvanto. (KEA sendas prov-ekzempleron al la asocioj kaj grupoj en samlingvaj landoj, cele al pretigo de novaj eldonoj adaptitaj.)

Ege utilas la foiro ankaŭ por la multaj kontaktoj kiujn ĝi provizas. La burĝonanta eldona fako de KEA, *Heliko*, tie mem kontraktis kaj pritraktis aperigon de diversaj presaĵoj, tre baldaŭ lanĉotaj en nia merkato.

La alia eksponanto ĉe kiu oni povis trovi libron en Esperanto, estis kompreneble la eldonejo José Martí: temas pri *Kubo Trarigarde*, verko pri Kubo voĉlegita por blinduloj sur ses kasedoj. Ĉiujn ravis la novaj teknikaj funkciiĝitaj de fakuloj de la kuba fremdlingva eldonejo, kiu ricevis la distingon pro la plej novigema budo en la foiro.

Interesa nova trajto en la ĉi-jara aranĝo estis la vendado de libroj, kio ne okazis en la antaŭaj jaroj. Furoris infanlibroj el diversaj landoj, anglalingvaj romanoj de la eldonejo Penguin, kelkaj ĵus aperintaj titoloj de naciaj eldonejoj, kaj la ĉiama Biblio, en diversaj eldonoj plurmil-ekzempleraj.

Kiel kutime, venis invito por la estonta foiro, en 1994. Profitu la okazon, kaj se vi ankoraŭ ne kuragiĝis transsalti la marojn cele al la "verda insulo", pripensu viajn planojn bone, ankoraŭ tempo sufiĉas.

Ni atendos vin librofoire.

Orlando Raola González (Kubo)

Estas oniflusto ke iu murdis Wolfgang Amadeus Mozart – per veneno.

Kion ni scias pri li, la aŭstria muzikisto kies kadavro troviĝas en mizera tombo en Vieno, la ĉi-jara kongresurbo? Preskaŭ muntoĉene, li fabrikis universale ravegan muzikon. Kiel kandelo flamanta je du finoj, li amuzis sin kun granda entuziasmo, sed ankaŭ same laboregis. Super ĉio, li estis la unua granda astro post la baroko, kaj prilumis la klasikan periodon. La vivo de Mozart, mirinda infano kaj poste grandsukcesa komponisto, estas abunde dokumentita.

Ankaŭ pri la misteraj cirkonstancoj de lia fina malsano en novembro 1791 kaj pri lia trista morto ekzistas pluraj versioj. *Oni sendis leteron sen subskribo al [Mozart] fare de mesaĝulo nekonata ... [kun demando] ĉu li verkas rekvie-meson. Kiom ĝi koston, kaj kiom da tempo necesus por fini ĝin? Mozart, kiu entreprenis nenion sen la scio de sia edzino [Constanze], informis ŝin ... ŝi konsilis lin akcepti la proponon. Li do proponis al sia anonima patrono ke li verkos la rekvie-emon kontraŭ certa monsumo ... post nelonge la mesaĝulo reaperis, portante ne nur la sumon petitan sed ankaŭ promeson, ĉar Mozart petis tiel modestan prezon, ke li ricevos plian pagon kiam li liveros la komponaĵon. Pretere, li rajtos verki laŭ la propraj ideoj kaj humoro, sed li ne provu eltrovi kiu mendis la verkon, ĉar tio certe estus vana.*



Jen kiel imagis nekonata artisto el la 19-a jarcento la mortantan Mozart.

Kiu murdis Mozart?

Por scii la tutan veron pri la komisiio, la muzika mondo devas atendi ĝis 1964, kiam historiisto malkovris dokumenton laŭ kiu la grafo von Walsegg, pasia amanto de muziko kaj teatro, aranĝis, pere de sia komerca reprezentanto Johann Sortschan, ke Mozart komponu rekvie-emon por lia amata edzino, mortinta la 14-an de februaro 1791.

Tiamaniere la mesaĝulo de diletant-a grafo fariĝis por Mozart la Anĝelo de la Morto.

Kvin minutojn antaŭ la unua hora matene, la 5-an de decembro 1791 (nur du monatojn post la sukcesa premiero de la opero *Die Zauberflöte*, La magia fluto) Wolfgang Amadeus Mozart mortis. Jen prikskribo de Georg Nikolaus Nissen, la dua edzo de Constanze:

[Mozart diris:] "Nun mi devas morti, kiam mi povus jam prizorgi vin kaj la infanojn. Ah, nun mi lasas vin senhelpaj." Subite li komencis vomu – ĝi sputis el li kiel arko, ĝi estis bruna –, kaj li estis morta."

En januaro 1792 la vidvino trovis sian finanĉan pozicion iom danĝera. Pro la morto de Jozefo la 2-a, la komisiioj al Mozart de la imperiestra kortego estis ĉesintaj; nesurprize, ĉar la italo Antonio Salieri, rivala komponisto, estis tie la ĉefo de la

orkestro. Lorenzo da Ponte, brila kunlaboranto de Mozart en tri italaj operoj, *Don Giovanni* (Donĵuano), *Le nozze di Figaro* (La edziĝo de Figaro) kaj *Così fan tutte* (Tiel agas ĉiuj virinoj), perdis sian oficialan postenon, kaj ankaŭ sian povon helpi Mozart.

Kvankam tre sukcesa, Mozart vivis en la tempo antaŭ kopirajto. Oni ludis lian muzikon ĉie, sed tio alportis gloron, ne oron.

La *Rekvie-emo* kuŝis nefinita.

Por ricevi la finan pagon de la grafo, Constanze devas starigi la miton ke Mozart ja finis la partituron. Ŝi petis la helpon de tri komponistoj, nome F. J. Freystädler, Joseph Eybler, kaj Franz Xaver Süssmayr, ekklernanto de Mozart, kiu jam helpis lin (sekretarie) pri la rutina surpaperigo de la *Rekvie-emo*. Mozart ne multe fidis lin, kaj Constanze verŝajne dungis lin nur ĉar Mozart jam klarigis al li detalojn de la instrumentado, kaj ĉar lia skribmaniero multe similis al tiu de la komponisto, li do povus facile falsi lian subskribon.

Kvankam ni neniam scios ĝuste kiom Süssmayr helpis pri la komponado, li certe scias ion pri la intencoj de la majstro, kaj li ja ĉeestis kiam Mozart movis la lipojn la lastan fupon, por klarigi kiel la timbaloj ludu.

Sed ni reiru al la morto, la plej enigma en la historio de la muziko. Mozart mem kredis ke iu venenis lin. Ankaŭ lia filo, Karl Thomas, same suspektis:

Aparte rimarkinda laŭ mia opinio estas la fakto ke iujn tagojn antaŭ ol [mia patro] mortis, lia tuta korpo ŝvelis tiel ke la paciento ne povis eĉ iomete movi sin, pretere estis odoraĉo, kiu montris internan diseriĝon kaj post la morto tiel pliiĝis ke nekropsio estis neebla ... alia stranga cirkonstanco estas ke la kadavro ne fariĝis rigida kaj malvarma sed ... restis mola kaj elasta.

Simile al romano de Agatha Christie, estas listo de suspektitoj kaj teorioj. Jen ili:

1. Franz Xaver Süssmayr, ĉar li havis amaferon kun Constanze Mozart;

2. Constanze Mozart, pro la sama motivo;

3. Barono Gottfried von Swieten, kiu aranĝis triaklasan funebbron por li;

4. Franz Hofdemel, ĉar Mozart adultis kun lia edzino, Magdalena;

5. Magdalena Hofdemel, instigite de sia edzo;

6. Antonio Salieri, ĉar li enviis lian talenton;

7. sekreta organizaĵo – la framasonoj, ĉar Mozart perfidis sekretojn, laŭ sia framasona ĵuro pri-estintadajn, en la opero *La magia fluto*.

Ni rigardu laŭvice la suspektitojn.

• Ne ekzistas pruvo ke Franz Xaver Süssmayr aŭ Constanze Mozart kulpis. Eble ili amis unu la alian; ŝi nomis sian lastan infanon Franz Xaver, kaj estas teorio ke ŝi koncipis la bebon kiam Wolfgang forestis. La nomo de Süssmayr estas forskrapita el ŝiaj leteroj, sed tute samas pri aliaj nomoj – kaj eble Nissen, ŝia dua edzo, faris tion. Iuj komentariistoj trovis indikon ke Mozart suspektris sian edzinon, ĉar en *Die Entführung aus dem Serail* (La fuĝigo el la serajlo), Belmonte, la protagonisto, dubas la amon de sia Constanze. Sed la fonto de la opero estis la teatraĵo de André, *Belmonte und Constanze* – Mozart do heredis tiujn nomojn. Plie, la konduto de Constanze post lia morto pravas ke ŝi vere amegis lin. Ŝi sternis sin sur la mortolito kaj ektenis lian kadavron, esperante infektiĝi kaj morti; poste, ŝi tute ne kapablis akompani la procesion al la tombejo. Akuzo nepruvebla.

• Mankas motivo por murdo ĉe barono von Swieten. Li ja aranĝis triaklasan funebbron por Mozart, sed li estis amiko de la familio (li trovis laboron por Wolfgang), kaj certe sciis ke Constanze ne povus permesi al si la koston de unuaklasa enterigo. Akuzo nepruvebla.

• La tagon post la morto de Mozart, Franz Hofdemel atakis sian gravadan edzinon per razilo, horore vundis ŝian vizaĝon, kaj poste sin mortigis. Laŭ la klaĉado de Vieno, Wolfgang kaj Magdalena adultis

(ŝi studis ĉe li), kaj li estis la patro de la bebo. La imperiestrino Maria Luiza interesiĝis pri la sorto de Magdalena, kaj ŝi certe ne farus tion se ŝi kredus la onidiron pri adulto. Akuzo nepruvebla.

• Laŭ onidiro, Antonio Salieri mem konfesis ke li murdis Mozart: ĉi tiu skandalo jam inspiris du operojn, dramon kaj filmon. Sed kiam Ignaz Moscheles* vizitis Salieri en oktobro 1823, ĉi tiu diris:

Mi povas certigi al vi ke tiu absurda onidiro ne estas vera... estas malico, nur malico, diru al la mondo, kara Moscheles, ke malĵuna Salieri, kiu baldaŭ mortos, diris tion al vi.


Monaton poste, li provis mortigi sin, kaj en 1825 li mortis, freneza. Ni ne povas kontesti la fakton ke Salieri kompletis profesie kontraŭ Mozart; sed li ankaŭ helpis lian filon, samkiel li helpis al la familioj de aliaj muzikistoj. Akuzo nepruvebla.

• Fine, mi ne povas kredi ke framasono, aŭ la framasonismo, aŭ alia individuo murdis Mozart. Kial?

Unue, la stato de la kadavro, “mola kaj elasta”, estis normala, ĉar ĉeloj kolektas akvon pro hidropso, kiu karakterizas fatalan kolapson de la renoj.

Aldone, Karl Thomas estis juna knabo kiam lia patro mortis: se li aŭdis lian suspekton pri veneno, li sendube kredis ĝin. Due, simple dirite, Wolfgang Amadeus Mozart mortis de fatala koktelo da malsanoj: reŭmatisma febro, rena kolapso, streptokoka infekto, cerba hemoragio, kaj fatala bronko-pneŭmonio. Ekzistas pruvo ke li jam sufiĉe serioze malsanis en la jaroj 1762, 1764-1767, 1770-1771, 1780-1781 kaj 1784, kaj ŝajnas ke lia metabolo simple ne havis sufiĉan forton por batali kontraŭ la epidemio kiu atakis Vienon en 1791.

Kaj la frataro de la Templo, la framasonoj? Ili ne respondecis pri la morto de sia glora adepto. Por aktive helpi lian vidvinon, lia logio publikigis kantaton verkitan de li, kaj donacis la tutan profiton de la entrepreno al ŝi. La plej grava indiko ke la framasonoj ne murdis Mozart,



Leopold Mozart, la patro, kun la gefiloj Wolfgang kaj Nannerl en Parizo, 1763/4.

troviĝas ĉe Schikaneder, la libretisto de *La magia fluto*. Se Mozart kulpis pri perfido de la sekretoj de framasonismo, Schikaneder des pli kulpis, ĉar li estis la motoro de la tuta afero.

Kaj li vivis, feliĉa kaj prospera, ĝis 1812.

Seán Osborne (Nederlando)

*Ignaz Moscheles (1794-1870), praga pianisto kiu loĝis en Londono inter 1826 kaj 1846, estis la patro de la artisto Felix Stone Moscheles (1833-1917), kiu prezidis la Londonan Esperanto-Grupon, kaj estis tre kara amiko de Zamenhof: li pentris ties portreton en 1905. Baptifilo de Mendelssohn, Felix Moscheles estis amiko ankaŭ de du tre gravaj komponistoj de la 19-a jc.: Chopin kaj Wagner (vd. L. Courtinat: *Historio de Esperanto [Movado kaj Literaturo]* 1887-1960, Bellerive-sur-Allier, 1964, kaj Marjorie Boulton: *Zamenhof: aŭtoro de Esperanto*, La Laguna, 1962).

UK Vieno – unuafoje internacia orkestro

Ni volus ludi simfonion de Mozart dum la UK en Vieno kaj serĉas ankoraŭ orkestranojn: ĉefe violononj, aldojn kaj violonĉelojn, krome transversajn flutojn, hoĵojn, klarnetojn kaj fagotojn. Skribu al Internacia Orkestro ĉe Thomas Kleemann, Bahnhofstr. 95, D-W-6904 Eppelheim, Germanio.

Niaj membroj respondas pri UEA kaj pri si mem

En 1991, lige kun la planita membrovarba kampanjo, UEA entreprenis enketon inter siaj individuaj membroj. La celo de la enketo estis informiĝi pri la bezonoj kaj deziroj de la membraro, pri la opinioj rilate la funkciadon de UEA, la enhavon kaj kvaliton de ties servoj. El la ĉ. 5500 ricevintoj – nur membro-abonantoj (MA) de UEA – la enketo resendis 866 membroj el 71 landoj.¹ Temas pri la plej granda nombro de celitaj enketoj en ĉiuj esploroj pri esperantistoj. Tamen, eĉ per sia relative alta resendo-proporcio (15%) la nuna enketo estas nur en la dua loko, post la esploro en Ĉeĥoslovakio realigita en la jaroj 1980/81.²

La enketon iniciatis Mark Fettes kaj Osmo Buller. Pri la teknika aspekto kaj pretigo kunlaboris Nikola Rašić. La grandan kaj penan laboron sumigi la rezultojn faris Chan Sook Wai, volontulo el Malajzio.

Nun pretas la unuaj rezultoj, t.e. la tabeloj kun la procentaĵoj. Por pli profunda analizo necesus multe pli fajna statistika prilaboro, kiun oni eventuale faros, se montriĝos neceso kaj ebleco.

Lando kaj lingvo: regas la angla

Plej multaj respondoj venis el Germanio (83), Francio (73), Nederlando (72), Brazilo (50), Usono (46), Britio (40), Italio (38), Sovetunio³ kaj Svedio (po 36), Japanio kaj Finnlando (po 33), Ĉinio (29), Ĉeĥo-Slovakio (21), Danlando (17), Hispanio (14), eks-Jugoslavio⁴ (13), Hungario, Svislando kaj Irano (11), Pollando (10) kaj Aŭstralio (9). La ceteraj enketoj resendis el kvindeko da aliaj landoj de ĉiuj mondopartoj. El la landoj kun la plej grandaj UEA-membronombroj po 15-35% de la MA-oj (membro-abonantoj) reagis. Tio ne validas nur por belgoj kaj islandanoj, kiuj respondis neklaringeble magre.

Se temas pri gepatraj lingvoj: anglalingvanoj okupas la unuan lokon (115 parolantoj). Sekvas la lingvoj germana, franca, portugala, kastilia (hispana), sveda, itala, japana, ĉina, rusa, hungara, dana, ĉeĥa, persa, pola kaj aliaj. Entute 71 diversaj lingvoj estis cititaj. Inter la 850 personoj kiuj respondis la demandon, troviĝis 20 dulingvaj, 6 trilingvaj kaj eĉ unu kvarlingva. Pluraj el la enketoj evidente troviĝas en pozicio de etna, respektive lingva, minoritato. Ekzemple: estis nur 11 enketoj el Hungario, sed pluaĵ 10 hungarlingvanoj, ĉiuj dulingvaj, el kvin aliaj landoj. Ĉirkaŭ 4% de la enketoj troviĝis en plurlingva situacio, en kiu plej ofte rolis la angla lingvo, kaj iom malpli la germana, hispana, kataluna, sveda kaj finna.

Tabelo 1 Enketoj laŭ la aĝo

	ĝis 20	21-30	31-40	41-50	51-60	61-70	pli ol 70	senresponde	sume
N	8	98	119	121	168	188	157	8	866
%	0,90	11,00	14,00	14,07	19,40	21,74	18,00	0,90	100

Aĝo: generacia breĉo

Ankaŭ en tiu ĉi enketo montriĝis tre alta aĝo de esperantistoj (vidu tabelon 1, malsupre). Pli ol 40% estas pli aĝaj ol 60 jarojn kaj 60% pli ol 50 jarojn. Tamen, la partopreno de aliaj generacioj estas ne tiom neglektinda, kvankam nur kvarono el ĉiuj estas malpli ol 40-jara. Veraj ĝejujuloj restas klare sub-reprezentitaj.

Sekso: kvar viroj, unu virino

Tabelo 2 Enketoj laŭ sekso

	viroj	virinoj	senresponde	sume
N	682	173	11	866
%	78,80	20,00	1,20	100

Tio estas absolute la plej granda disproporcio ricevita en ĉiuj ĝisnunaj statistikaj esploroj! Ĉu nia movado vere konsistas plejparte el viroj – aŭ virinoj ne emas enketiĝi?

Profesio: pintas pensiuloj

La plej granda grupo estas, kompreneble, pensiuloj: ĉ. 30% (vidu tabelon 3 dekstre supre). Inter la profesie aktivaj gravas mencii instruistojn (12%), kiuj montriĝas – laŭ la rezultoj de diversaj esploroj – grupo ĝenerale aktiva en diversaj sociaj movadoj.

En la grupo "aliaj" sidas pluraj senprofesioj, dommastrinoj ks., sed ankaŭ iom da soci-sciencaj kaj humanismo-fakaj profesioj (sociologoj, psikologoj, artistoj ks.).

Eduk-nivelo: multaj kleruloj

Konsiderante la relative altan mezan aĝon de la specimeno, evidente temas pri grupo pli alte edukita ol estas la nacia averaĝo en pluraj landoj.

Tabelo 4 Enketoj laŭ eduk-nivelo

	elementa	meza	universitata	senresponde	sume
N	42	283	517	25	866
%	4,8	32,7	59,7	2,8	100

Familio: aktivas soluloj

Pli-malpli triono el ĉiuj enketoj vivas sola (29.3%), kio estas sufiĉe alta procentaĵo se konsideri ke ne temas pri tiom juna grupo. Ankaŭ en aliaj enketoj estis malkovrita sufiĉe signifa korelativo inter soleco kaj aktivado en la movado.

Tabelo 5 Enketoj laŭ familia stato

	sola	kunloĝanta	senresponde	sume
N	254	515	93	866
%	29,3	59,5	10,7	100

Tabelo 3 Enketitoj laŭ profesio

	studentoj	instruistoj	oficistoj	medicinistoj	teknikistoj	natur- sciencistoj	emeritoj	aliaj	senresponde	sume
N	35	109	100	34	108	22	249	166	44	866
%	4,00	12,5	11,60	3,9	12,5	2,50	28,8	19,2	5,00	100

Membreco en UEA: fidelas engaĝitoj

Tabelo 6 Enketitoj laŭ la daŭro de esperantisteco

	malpli ol 2 jaroj	2-5 j.	5-10 j.	11-20 j.	pli ol 20 j.	sen- responde	sume
N	29	118	123	151	444	2	866
%	3,3	13,6	14,2	17,4	51,3	0,2	100

Temas ĉefe pri fidelaj multjaraj membroj de UEA. Tre malgranda nombro estis tute freŝaj membroj.

Tabelo 7 Ĉu vi estas ... ?

	N	%
regula membro de UEA (averaĝe 16,9 jaroj)	651	75,23
nova membro de UEA	146	16,74
nerregula membro de UEA	36	4,19
senresponde	33	3,84
sume	866	100,00

Membreco en aliaj Esperanto-organizaĵoj: la ne-neŭtrala kvarono

Iom pli ol kvarono (28%) aktivas kaj membras ankaŭ en aliaj E-asocioj. Plej oftas membroj de SAT, ILEI, KELI, IKUE, TEVA, UMEA, MEM, IKEL, Monda Turismo (laŭ tiu vicordo), kaj deketo da aliaj. Interesa estas la unuaranga de ĝuste ne-neŭtralaj organizoj kiaj SAT (76 enketitoj) kaj MEM (12), kaj la du religiaj organizoj (KELI: 35 kaj IKUE: 28) aliflanke. Ankaŭ la vegetaranoj staras sufiĉe alte sur la listo (21).

Tabelo 8 Ĉu vi estas ... ?


	N	%	jaroj averaĝe
(fak)delegito de UEA?	384	44,42	13,4
dumviva membro de UEA?	144	16,74	17,49
membro de landa asocio?	643	74,19	17,64
membro de loka klubo?	545	69,14	13,36
membro de aliaj E-asocioj?	248	28,37	—

Diplomoj

Ĉirkaŭ 60% el la enketitoj jes posedas iun diplomon aŭ ateston pri scio de Esperanto.

Motivoj kaj opinioj: humanismo firmas

Se temas pri la motivoj de daŭra okupiĝo pri Esperanto, montriĝas ke esperantistoj emas konsideri sin humanismaj idealistoj. Plej altan valoron ili donas al la motivo "kontribuo al pli bona mondo". Poste sekvas bunta motivovaro. Ŝajnas ke Esperanto ne rolas ĉe multaj en la rilatoj kun proksimuloj. Radioaŭskultado apenaŭ citiĝis kiel motivo.



Tabelo 9 La plej gravaj motivoj por daŭra okupiĝo pri Esperanto

(ĉi tie kaj en la sekvaj tabeloj, la plej alta ebla noto estis 8) relativa valoro

kontribuo al pli bona mondo	6,02
kono de homoj el aliaj landoj	5,63
intereso pri lingvoj	5,04
sento de aparteno el E-komunumo	4,66
legado de libroj kaj revuoj	4,38
vojaĝado	3,80
personaj rilatoj kun proksimuloj	3,26
utileco en profesio aŭ ŝatokupo	2,18

Peter G. Forster en sia esploro de la brita movado en 1968 starigis du similajn demandojn:

1. Kion, laŭ via opinio, la Esperanto-movado devus elstarigi en sia propagando?
2. Kion vi mem opinias grava en la Esperanto-movado?

La rezultoj montris ke esperantistoj emas prezenti sin eksteren kiel reformisma movado (valor-orientita), dum interne de la movado ili elstarigas kiel plej gravan valoron la intimecon de la esperantista komunumo. Do: "rondo familia" kontraŭ la "mondo eterne militanta".

Sed en tiu ĉi enketo kiel la tri plej subtenindajn agadterenojn de UEA oni emfazas ĝuste tiujn eksteren celantajn. Nur poste venas la graveco de diversaj praktikaj servoj de UEA kaj de ĝiaj internaj, mikro-sociaj funkcioj. Do, la esperantistoj atendas de UEA pli da movado ol da administrado.

Tabelo 10 Kio estas plej subteninda en la agado de UEA?

	relativa valoro
informado pri Esperanto, pri lingvaj problemoj	5,10
reprezentado ĉe internaciaj instancoj	4,78
vastigo de la movado al novaj mondopartoj	4,59
praktikaj servoj	4,40
kreskigo de interhoma solidareco	3,67
kunligado de landaj E-asocioj	3,57
stimulo de faka uzado de Esperanto	3,34
eldona agado	2,66

Al kio UEA, laŭ via opinio, ne donas sufiĉe da atento en sia agado?

La demando kolektis similajn reagojn kiel tiu pri la subtenindaĵoj en la agado de UEA. La plej multaj respondintoj opinias ke estas neglektita la reprezentado de UEA ĉe internaciaj instancoj (60 enketitoj, resp. 7%). Samtempe tridek (3,5%) pensas ke UEA devus dediĉi pli da atento al la vastigo de la movado en Azio kaj Afriko. Aliaj skribas ke plian atenton meritas la kunligado de landaj kaj fakaj asocioj (19), aŭ la praktika kaj scienca uzado de la lingvo (22). Kelkaj opinias ke nesufiĉan atenton UEA dediĉas al sia junularo.

Servoj de UEA: revuo, Jarlibro, Kongreso

La plej multaj konsideras la revuon *Esperanto* la plej grava servo de UEA. Nur iom malpli alte taksigas la valoro de la Jarlibro. Sur la tria loko estas la Universalaj Kongresoj, kaj poste venas la Libroservo kaj la Katalogo. La financaj servoj kaj la revuo *Kontakto* listiĝas kiel lastaj, certe ankaŭ pro tio ke ne ĉiuj membroj uzas tiujn servojn (vd. tabelon 12).

La revuo

Pli ol unu triono (35%) legas praktike la tutan revuon kaj iom pli ol duono grandan parton de ĝi. En 35% de

la kazoj la revuo estas legata de pluraj personoj, plejofte de du (22%), verŝajne kunloĝantoj.

La plej ŝatataj temoj montras jenan hierarkion: Movado – Lingvo – Komunumo. Kulturo venas nur poste, ĉefe se konsideri la malaltan popularece de recenzoj.

Tabelo 11 Kiuj temoj/rubrikoj en la revuo plaĉas al vi?

	relativa valoro
la E-movado ĝenerale	6,55
la lingvo	4,88
Universalaj Kongresoj	4,57
informaj rubrikoj	3,83
intervjuoj kaj reagoj	3,61
kulturo kaj historio	3,34
UN kaj UNESKO	3,30
mallongaj novaĵoj kaj komentoj	3,17
UEA kaj TEJO	2,89
recenzoj	2,89

informaj rubrikoj= Laste aperis, Kalendaro ks.
mallongaj novaĵoj= Foliume, Loke-Fake-Persone
UEA kaj TEJO= Estraro kaj Komitato, Oficejo, Jarraporto ks.

Jarlibro, Libroservo

Jarlibron ne uzas nur 10% de la enketitoj. Aliaj (t.e. 85,7% el la respondintoj) uzas ĝin averaĝe pli ol 18 fojojn jare.

Cirkaŭ duono el la enketitoj estas klientoj ĉe la Libroservo de UEA. Unu kvinonon oni povus konsideri regulaj libroaĉetantoj (unu ĝis tri aĉetoj jare). Plej multaj turnas sin al la libroservo malpli ol unufoje en la jaro. Por la aĉetantoj unuarange gravas persone "palpi" la librojn en la kongresa aŭ klubla libroservo, por fari definitivan decidon pri la aĉeto. Dualeke influas la recenzoj en *Esperanto* kaj trialoke la katalogo de UEA. Gravas ankaŭ la informoj en la rubriko "Laste aperis" kaj recenzoj, anonoj en aliaj revuoj. Anoncoj en *Esperanto* ne tiom rolas kiel varbilo por la libroaĉeto.

Tabelo 12 Kiuj estas por vi la plej gravaj servoj de UEA?

	relativa valoro
Esperanto	4,54
Jarlibro	4,41
Universalaj Kongresoj	3,78
Libroservo/Katalogo	2,44
Financaj servoj	1,29
Kontakto	1,25

el la baldaŭ aperonta libro

Sociologiaj esploroj pri esperantistoj de Nikola Rašić

NOTOJ

¹Fakte cititaj estis 77 diversaj landoj, el kiuj tiutempe 67 internacie rekonitaj. Krom Ruslando, Ukrainio, Estonio, Litovio, Latvio kaj Armenio, estis menciitaj ankaŭ Katalunio, Norda Irlando, Skotlando kaj Kebekio.

²Vd., Durnová, M: *Sociologia esploro de sintenoj al Esperanto*, ĈEA, Prago 1981.

³Tiu cifero inkluzivis ankaŭ enketitojn el Estonio (3), Latvio (3), Litovio (4), Ukrainio (4) kaj Armenio (1). La resto deklaris kiel sian landon "Sovetio".

⁴La enketo okazis antaŭ la disfalo de la lando. Respondis fakte 6 kroatoj, 3 serboj, 2 hungaroj, 1 sloveno, 1 makedono.

Ĝustigo

Mia artikolo pri Gaston Waringhien (*Esperanto*, feb. '92, p. 26-28) estis bedaŭrinde presita kun modifoj, pri kiuj mi deziras atentigi la legantojn:

1. Kvankam Waringhien uzis ambaŭ formojn, la hispanan *Maura* kaj la esperantan *Maira*, mi sistemece uzis en mia artikolo la formon *Maira*.

2. Mi uzis majusklojn en la personnomoj adjektive uzataj. Oni do legu: "la Zamenhova Originala Verkaro", "... la Varingjenan virtuozecon ..."

3. Konforme al la Zamenhova modelo, mi uzis la akuzativon en la jenaj frazoj:

"En 1937 li adaptis al la franclingvaj uzantoj la *Ilustritan Kurson* (...) kaj publikigis la *Tradukon de la provteksto en la Gvidlibro*."

"Tiu verko (...) enhavas *Skizon de Esperanta metriko* (...), *Arton poetikan* (...) kaj *Rimvortaron* (...)."

Michel Duc Goninaz (Francio)



Agi en eksterafriko. Konsiloj kaj sugestoj por partopreni la afrikano agadon. Komp. Hans Bakker (laŭ la rezultoj de kunveno en Aalen, Germanujo, marto 1991). Sen bibliografiaj indikoj. 1992. 20p. 21cm. 3.00 gld.

Al la tero returne. Gilbert R. Ledon. São Paulo (neindikita): la aŭtoro, 1992. 160p. 21cm. Prezento de la gravaj problemoj de la homaro, kun konkretaj ekzemploj por socia kaj individua viv-pilbonigo. 15.00 gld.

Almanako Lorenz 1992. Div. aŭtoroj. Rio de Janeiro: Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, 1992. 96p. 21cm. Artikoloj, eseoj kaj poemoj plejparte spiritismaĵoj, 9.30 gld.

Esperanta vortstrukturo kaj Esperanta toponimiko. Carl Stop-Bowitz. Oslo: Studenta Esperanto-societo, 1985. 32p. 21cm. Kontribuo al la landnoma debato. 8.70 gld.

Esperanto, het levenswerk van Zamenhof. Ghislaine Tilleux. El Esperanto trad. en la nederlandan Johan v.d. Hoek. Heerhugowaard: la tradukisto, 1991. 15+3p. 30cm. Desegnis Bruno Disano. Nederlanda eldono de *Zamenhof bildrakote*. 6.00 gld.

Esperanto kiel revelacio / O Esperanto como revelação. Francisco Cândido Xavier. Diktita de la spirito de Francisco Valdomiro Lorenz. El la portugala trad. Benedicto Silva. Araras: Instituto de Difusão Espírita, 1976. 160+16p. 19cm. Pri Esperanto ĉe homoj kaj spirito; bibliografio de F. V. Lorenz; priesperanta skizo de la tradukinto. 9.90 gld.

Faŝismo, La. (La totalisma ŝtato). Jeŭju Jeleŭ. El la bulgara trad. Nikola Stranĝanski. Sofia: Pres-Esperanto, 1992. 351p. 20cm. Kiel ekostas, daŭras kaj disfalas totalisma reĝimo – monografio de eks-disidento, nuna ŝtatestro bulgara. 33.60 gld.



Fundamenta krestomatio de la lingvo Esperanto (1903). L. L. Zamenhof. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1992 (18a eld.). 18+446p. ISBN 92 9017 044 1. 21cm. Kun notoj kaj antaŭparolo de G. Waringhien. Bind. Kromkolora. Jubilea kolekto n-ro 6. La senŝanĝan tekston kompletigas notoj de Waringhien pri la nuna lingvouzo. 48.00 gld.

Fundamento de Esperanto. Franca eldono. L.L. Zamenhof. Wilrijk: Sonorilo, 1990. 90p. 20cm. La Gramatiko en la franca, Ekzerco kaj Universala Vortaro. 12.90 gld.

Gabrielo. Historio de maldika viro. Henriëtte van Eyk. El la nederlanda trad. Rejna de Jong. Den Haag: Esperanto Kultura Servo, 1990. 203p. 21cm. Delikatenta, humura fabelo por plenkreskuloj, el 1935. 24.60 gld.

Hura-a-a-a. Daniil Harms. El la rusa trad. Natan Procenko. Thaumiers: La Kancerkliniko, 1991. 32p. 30cm. Scenoj, noveloj kaj aliaj absurdajetoj de verkisto (1904-1942) kiu motoris la estetike ribelan skolon HURA. 8,10 gld.

Iter latinum. Gerardo Mattos. Chapeco: Fonto, 1989. 211p. 21cm. Lernolibro de la latina, kun latinaj klarigoj, 18,00 gld.

Kaj ni solas. Heinz Kahlaŭ. El la germana trad. István Ertl. Bellinzona/Budapeŝto: Hans Dubois, 1991. 68p. 22cm. 46 simplaj poemoj de orientgermana poeto, el kiu 16 ankaŭ en la originalo. 8,10 gld.

Kongresistikaĵ notoj. Gian Carlo Fighiera. Bydgoszcz: Esperantotur, 1992 (neindikita). 45+12p. 21cm. Parto unua. Resumo de studocelo uzata, itallingva fakverko de la aŭtoro. 7,50 gld.

Kormoranoj ankoraŭ ne revenis, La. Nándor Gion. El la hungara trad. László Huszár. Bielsko-Biala, Thaumiers, Subotica: KLEKS, Kancerkliniko, E-Societo Subotica, 1991. 114p. ISBN 83 85159 01 0. 19cm. Pri-sed ne nur por-infana romano el Jugoslavio pri la eterna konflikto inter la infana kaj plenkreskula mondoj. 21,90 gld.

Lernolibro de Esperanto en sciencoj kaj teknikoj. Shao Rong (Soliva). Dalian: DLGD, 1989. 206p. 26cm. Kun fakaj tekstoj kiel leg-materialo, plus gramatiko kaj ŝlosilo; por ĉinoj. 12,00 gld.

Lingvaj respondoj (1927). L. L. Zamenhof. Jekaterinburg: Sezonoj, 1992. 55p. 20cm. Represo de la eldono el 1927. 9,00 gld.

Ludovikologia dokumentaro VI. Diverslevdaj broŝuroj. Tōkyō : Ludovikito, 1992. 491p. 21cm. Eble neniam kompletigitaj necesaj adonoj al la PVZ. Kolekto 6. La Dua Libro en la rusa; la Ekzerco en la franca, rusa kaj pola; fruaj broŝuroj en la germana, franca, rusa, pola, portugala, nederlanda, angla. 57,00 gld.

Materialo pri la oficiala Esperanto-instruado en Ĉinio. Shao Rong (Soliva), Zhang Xiaoxia. Dalian, 1991 (2a eld.). 42p. 20cm. Kun adresoj kaj statistikoj, 4,50 gld.

Mil ekzotaj vortoj. André Cherpillod. Courgenard: la aŭtoro, 1992. 122p. ISBN 2 906134 17 1. 21cm. La etimo de 1250 esperantaj vortoj de eksterĉiropa deveno. 24,90 gld.

Moroj de ĉinaj nacimailmultoj. Komp. Li Qiang. El la ĉina trad. Hang Jun, Nan Youli. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldo-

nejo, 1991. 105p. ISBN 7 5052 0021 6. 19cm. Pri festoj kaj kutimoj de 20 minoritataj etnoj, 4,50 gld.

Ne facilas esti sloveno en Italio. Anita Perić Altherr. Eschweiler: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, 1991. 160p. 21cm. Serio *Etnoskizoj n-ro 1*. La historio kaj situacio de la slovena minoritato en Italio. Kun mini-portreto de la lingvo kaj beletraj specimenoj; antaŭparolo kaj prezento de IKEL ankaŭ en la itala kaj slovena. 25,20 gld.



Noĉnik – Noktulo. Zdravko Seleš. Durdjevac: Koko, 1991. 59p. 16cm. Du deko da kontemplemaj poemoj, ankaŭ en la (ŝtokava) kroata. 7,20 gld.

Pasporta Servo. Listo de gastigantoj de TEJO, 1992. Rotterdam: TEJO, 1992. 130p. 21cm. 18,00 gld.

Sciencaj verketoj en Esperanto. Ye Shuzi. El la ĉina trad. Jesuz. Alteduka Eldonejo de Guang Dong, 1990. 144p. ISBN 7 5361 0443 X. 19cm. 30 popularsciencaj artikoloj, el du lingvoj. 4,50 gld.

DIVERSAĴOJ

Ĉinio: Memor-koverto por la 40-jariĝo de El Popola Ĉinio. 1990. 4,50 gld.

Kasedo: Ĉu ne? Amplifiki. Pisa: Edisudio, 1991. Unu horo da plurfaceta muziko de la – denove – novkonsista poŝgrupo (i.a. Micke Englund, Jomart kaj Nataŝa), 21,00 gld.

Kasedo: Proceso multkolora. Kajto. Tekstoj de N. Kalma, L. Deij, S. Chaves, M. Boulton, P. Thorsen, J. Duijs. Drachten: Flugdrako, 1992. Dek ok kantoj plejparte originale verkitaĵ. 19,50 gld.

ABONSERVO

La Libroservo peras ankaŭ: *La Dua Jarcento*. Informilo de IEMW. 5 n-roj jare. 33,00 gld.

Korekto: La kotizo de *Sciencia Revuo* por 1992 estas 38,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insigno k.s. 18,5% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mend!

Pri la bona, tute ne kompleta Esperanto

En *Esperanto* de novembro 1991 aperas intervjuo kun s-ro Claude Piron sub la titolo *Lingvo ne perfekta, nur normala*. Kiel sciate, s-ro Piron ĉampionas "la bonan Esperanton", kies generala principo baziĝas sur tio ke la enkonduko de neologismoj iom post iom transformas la lingvon en okcidentan dialekton, kun la terura sekvo ke la ĉinaj esperantistoj devas lerni ĉiam pli da bastardaj radikoj eltiritaj el lingvoj eŭropaj, ĉefe latin-devenaj kaj anglo-saksaj.

Ĝis nun la antineologismaj zelotoj emfazis ke la novismoj absolute superfluas ĉar la aglutina karaktero de Esperanto havas la mirindan povon provizi eĉ plej subtilajn paralelojn de la plej rafinitaj vortoj kaj esprimoj troveblaj en la naciaj lingvoj. Tion kredas la eternaj komencantoj (kiuj samtempe pravigas tiel sian pokan deziron serioze okupiĝi pri la lingvo) kaj multaj fervoruloj, eĉ eminentaj, kiuj trans la realon vidas nur la imagon de sia propra fantazio. Ili unuanime kunaplaŭdas la aserton de Ivo Lapenna en lia *Retoriko*, p. 110: "La internacia lingvo multrilate superas la naciajn ne nur kiel komunikilo en la ĉiutaga vivo, sed ankaŭ kiel arta esprimilo".

Sed jen, okazas nun ke s-ro Piron dekretas ke Esperanto "tute ne estas kompleta lingvo"!

Je Dio, en kiun sak-straton puŝas nin la aŭtoro de tiel revolucia kaj konsterna konfeso? Se la neologismoj venenas la bonan Esperanton per siaj okcidentaj virusoj, kaj se aliflanke Esperanto "tute ne estas kompleta lingvo" malgraŭ sia miraklofara aglutineco, do per kia Diinspirita preskribo ni povos elimini la mankojn de nia kara lingvo? De s-ro Piron (kiu ludas per la konceptoj "bona Esperanto", "okcidenta dialekto de Esperanto", kaj nun per "la tute ne kompleta Esperanto") ni atendegas savan orientadon, por ke nia lingvo povu disvolviĝi interne de

la plej rigora ortodoksismo, sen ke ĝi infektiĝu je la okcident-dialekta herezo.

Nu, ni estu seriozaj, s-ro Piron. Esperanto havas okcidentan leksikon, okcidentan tradicion, okcidentan spiriton kaj okcidentan aspekton. La natura fonto de Esperanto estas okcidenta, kaj el tiu fonto oni ĉerpis, ĉerpas kaj ĉerpos, ĉu plaĉos, ĉu ne plaĉos al li. La konstanta pledo de s-ro Piron por la orientaj popoloj, ĉefe por la ĉina

Multaj jam
rompis lancon
en la "neologisma",
fakte lingvokoncepta
debato ...



gento, kompreneblas, se la leksiko kaj la tradicio de Esperanto apartenas al la orienta mondo.

La esperanta alfabeto venas de la latina kun ĉiuj ĝiaj absurdoj; sed se iam oni bezonus aldoni alian literon, ĝi estus same latina, ne ia signo ĉina aŭ japana. Valoras atenti la opinionon de K. Kalocsay: "Esperanto estas... la plej juna membro de la hindoeŭropa lingvo-familio. Se mi ne kredus tion, estus de mi stulte fari literaturon en Esperanto". (*Vojaĝo inter la tempoj*, p. 194). Kaj jen kion li pensas pri la "okcidenta dialekto": "... la paralela pliriĉiĝo de la esperanta literaturo kaj espe-

ranta vortprovizo estas tute natura fenomeno, pri kiu miri, protesti aŭ malesperi ŝajnas al mi simpla naiveco" (*Infero*, p. 276).

Ŝajnas ke s-ro Piron kreas al si fantomojn kaj sin distras batalante kontraŭ ombrojn. De mia flanko, mi preferas verki, kiel Kalocsay, per "vort-elekto ofte senutile ekster-esperanta" (tio signifas, supozeble, uzi "okcidentan dialekton") ol tordadi kun s-ro Piron ŝnurojn el sablo.

Cetere, mi dankas al s-ro Piron lian ĝentilon: "Pri Fernando de Diego, mi admiras kaj ĝuas lian mastrecon de la Esperanta frazo..." Iam, ie, mi same diris ke mi tre ŝatas la vigan, facilan lingvon de s-ro Piron... kaj mi aldonu nun ke mi

ŝatas ĝin ĉefe pro ĝiaj stilo kaj leksiko pure okcident-dialektaj.

S-ro Piron asertas: "vi ne povas esprimi (en Esperanto) ĉion kion vi povas esprimi angle, ruse, ĉine aŭ france. Sed la samo validas pri ĉiu lingvo". Ne, s-ro Piron, ne la samo. Dum la nacilingvaj vortaroj havas proksimume la saman riĉon, la esperanta vortaro, eĉ PIV, nanas kompare al ili, malgraŭ siaj kummetitaĵoj eblaj kaj neeblaj. Paralelaj esprimoj kaj kliŝoj estas multege pli abundaj inter la nacilingvaj vortaroj ol inter la nacilingvaj kaj esperantaj. Ne necesas esti leksikologo por facile konstati tion. Jen nur unu ekzemplo:

Malgraŭ tio, certaj ne-eŭropaj (inkluzive de ĉinaj) esperantistoj, kiuj konas unu eŭropan lingvon, tre ŝatas elpreni el ĝi iun vorton, fari iom da ŝanĝo en la prononco aŭ en la skribo, kaj poste uzi ĝin kiel novan esperantan vorton. Claude Piron skribis en unu letero: "Mi esperas ke pli kaj pli homoj komprenos ke Esperanto ne estas hind-eŭropa lingvo, almenaŭ en la profundaj strukturoj, kaj ke estas perfidi ĝian spiriton senĉese enkonduki novajn radikojn por esprimi ideojn kiujn oni tre bone povas esprimi per kunmetitaj vortoj." Ĝuste la lingvo-instruaj romanoj

grajje (antaŭ parto de la ŝilo) BS CV EW HL PCB QJ PIV
 gravulo (birdo graculo) H1
 gratatore (birdo gratator) CV EW HL
 -gramo (afrikano) H1
 granario (-granejo) BS Sin
 grandako (savieno de grandakulo) BS HE PI SK Sin
 grandulino (virino) BS Sin
 Gratilao (virino) Gratienu: AC
 gratifli BS HL IGB PCB QJ PV - gratifiki BS HL IGB PCB QJ PIV PV
 gratifikacie BS CV EW HL IGB QJ PV Z
 grato (malmanĝado) H6 P46
 Grubindilo (aviso kamiono Grubindem) EW SAT Z
 grubulo BS CV EW HL PCB QJ PI SK
 gruvestro TF
 grufe (-ungulo) P6v
 gregarino (gratizo gregarini) AC - gregarino TF
 Gremede (antaŭ Eldul) TF H1n
 Grestizono (esperantista kulturozono)
 grifio (forŝita ostro gryonell) CV EW HL
 grilo (antaŭ ŝakulo) EW
 gristatore (antaŭ lekulo) EW
 Grudno (sovietia urbo "pouso") LA P1
 grulo (brunka kaco) EW
 grulante (glato) EW HL
 grupeto (amika grupo) CV
 guanine (azota bazo) H6 QJ
 gudjero (ortido) penderon: WP
 Gudruna (virino) AC
 Gudula (virino) H3 War

... kaj arbitro (el "Nepivaj vortoj")

de Piron estas ŝatataj kaj facile akceptataj precipe de ĉinaj kaj ne-eŭropaj komencantoj de Esperanto. Ĉu tio ne rezultas ĝuste el la fakto ke la aŭtoro restigis la simplecon de Esperanto? S-ro Claude Piron diris ankoraŭ al ni ke nun multaj esperantistoj en okcidento jam rimarkis la simplecon de Esperanto, kaj jam ekuzas pli ofte kunmetitajn vortojn.

Estas ĝojinde ke ne nur en okcidento, sed ankaŭ en oriento, en Ĉinio, pli kaj pli multaj esperantistoj komencis atenti tiun problemon: restigi Esperanton esperanteca.

Liu Xiaojun (Ĉinio)

Pri interlingvistaj lingvokonoj

Por prepari teman tagon de la Asocio Nederlanda de Scienculoj Esperantistaj, mi volis esplori ĉu, koncerne la konon de fremdaj lingvoj, estas rimarkinda diferenco inter la adeptoj de Esperanto kaj Interlingua, kaj precipe ĉu Interlingua, planlingvo iom ĝenerale dirite konstruita per la kolektado de komunaj vortoj el la latinidaj lingvoj, praktike allogas preskaŭ nur homojn konantajn tiajn lingvojn. Tial mi publikigis anoncon en *Esperanto* (majo 1991), en kiu mi demandis al la legantoj, kiu estas ilia gepatra lingvo kaj kiujn lingvojn ili krome konas.

Kompletan statistikon pri la rezultoj mi ne donas. Interalie, la rezultoj plurilaste aspektas ne tre fidindaj komparete kun aliaj informoj pri la Esperanto-movado. Tial pri la gepatraj lingvoj de la respondintoj mi diras nur ke la respondintoj havas 26 malsamajn gepatrajn lingvojn, kaj inter ili plej multnombraj estas la germanlingvanoj (23 = 20%), francilingvanoj (18 = 16%), nederlandlingvanoj (12 = 11%), anglalingvanoj (9 = 7,9%), hispanlingvanoj (8 = 7,0%), kaj fine 3 = 2,6% denaskaj esperantistoj.

La respondintoj menciis 44 fremdajn lingvojn. Kiel fremdajn lingvojn 76 (67%) konis la anglan, 45 (39%) la francan, 43 (38%) la germanan, 27 (24%) la hispanan, 16 (14%) la italan, 16 (14%) la rusan, kaj 14

(12%) latinon. Entute 83 (73%) konis latinidan lingvon kiel gepatran aŭ fremdan lingvon, dum 9 (7,9%) konis nur Esperanton kaj sian gepatran lingvon.

Tiurilate la konsisto de la esperantistaro ŝanĝiĝis konsiderinde ekde la tempo inter la du mondmilitoj, kiam la bildon de la esperantistaro difinis la laborista esperantisto, konanta nur Esperanton kaj sian gepatran lingvon. Ankaŭ el aliaj esploroj,* ni scias ke la gravitocentro de la Esperantomovado en la pasintaj sesdek jaroj translokiĝis de la laboristoj al la intelektuloj. Tamen ankaŭ nun Esperanto montras bonan kombino de allogiveco por la intelektuloj kaj por la ordinara popolo, kaj inter la intelektuloj ne tro ekskluzivan allogivecon por homoj konantaj unu difinitan grupon de lingvoj. Tial Esperanto montriĝas bone preparita por la rolo de mondolingvo.

Por ĉi tiu esploro mi akiris tuj la kunlaboron de la redaktoro de *Esperanto*, sed la redaktoro de *Panorama in Interlingua* rifuzis publikigi mian enketon, ĉar li timis ke ĝi produktos rezultojn malfavorajn por Interlingua. Inter miaj demandoj al la Interlingua-istoj estis ankaŭ: "Se vi konas latinidajn lingvojn, ĉu vi lernis ilin antaŭ aŭ post Interlingua?" Verŝajne li timis ke enketo montrus ke la adeptaro de Interlingua konsistas preskaŭ nur el homoj konantaj

latinidajn lingvojn. Ĉiu planlingva movado, ankaŭ se ĝi pretendas ke ĝia planlingvo havas sciencan bazon, havas intereson bari novan sciencajn esploron, kiu minacas subfositi tiun bazon!

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

*Vd. ekz. "Who Are the Speakers of Esperanto?" (Kiu estas la parolantoj de Esperanto?) de Claude Piron en *Interlinguistics: Aspects of the Science of Planned Languages* (Interlingvistiko: Aspektoj de la scienco de planlingvoj) de Klaus Schubert (Mouton/De Gruyter, Berlin/New York, 1989).

Simpozio pri nacilingva tradukado de Esperanta literaturo

organizita de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA) ĉe Internacia Kultura kaj Kleriga Centro, Sobotské náměstie 6, CS-058 01 Poprad, Ĉeĥoslovakio, okazos inter la 1-a kaj 6-a de oktobro 1992.

La programon, kiu jam enhavas prelegojn pri tradukado en la lingvojn bulgaran, hungaran, italan, nederlandan, polan kaj portugalan, gvidos István Ertl.

Ĉiuj estas bonvenaj, sed kiel prelegontoj preferataj estas tiuj kiuj sukcesis publikigi siajn tradukojn. Prelegontoj anoncu sin ĉe la sekretario de EVA, D-ro Willem Verloren van Themaat, Volkerakstr. 381 1078 XT Amsterdam, Nederlando; partoprenantoj aliĝu ĉe IKKC.

Beletro pli popularis

Du libroj, kiuj eliris en sama semajno en junio, rivalis pli la unua loko en la furorlisto 1991 de la libroservo de UEA: *Nova Esperanta krestomatio* konkeris la pintan lokon kun eta margeno antaŭ *Pasporta Servo*. Estas neofte ke *Esperanto-dokumentoj* aperas en la furorlisto. Nia statistiko ne distingas inter unuopaj kajeroj, sed pli ol 90-procente temis pri la eseo de Mark Fettes *Al unu lingvo por Eŭropo? La estonteco de la eŭropa Babelo*.

Beletremulo ĝojas ke la liston de unuopaj vendoj eniris eĉ kvar originalaj romanoj (Baghy, Matthias, Rosbach) kaj unu tradukita novelaro (Ĉehov), dum en la antaŭa fojo la proza antologio *Trezoro* estis la sola beletraĵo. Ke la poemaroj de Dresen kaj Adamson konkeris altan lokon en la entutaj vendoj, okazis dank'al

NOVAJ KOMITATANOJ B 1992/95

Laŭ la anonco en la novembro n-ro de ĉi tiu revuo (p. 199), la 15-a de februaro estis la limdato por proponi kandidatojn por novaj Komitatoj B. Ĝis la limdato la Centran Oficejon atingis nur 8 validaj kandidatiĝoj. Konforme al la Ĝenerala Regularo (art. 8.3), ĉar la nombro de la validaj kandidatoj ne superas la nombron de elektablaj Komitatoj B (disponebblaj estis 9 lokoj), ne necesas okazigi elektojn kaj ĉiuj 8 validaj kandidatoj aŭtomate fariĝas Komitatoj B de UEA por la periodo 1992/95.

La novaj Komitatoj B estas: *s-ro Hans Bakker* (Nederlando, nask. 1937), *d-ro Thomas A. Goldman* (Usono, 1918), *s-ro Mark Fettes* (Nov-Zelando/Kanado, 1961), *s-ro Ian Jackson* (Britio, 1958), *d-ro Ulrich Lins* (Germanio, 1943), *s-ino Michela Lipari* (Italio, 1948), *d-ro Humphrey Tonkin* (Britio/Usono, 1939), *d-ro John C. Wells* (Britio, 1939).

la imitinda donaco de nia finna landa asocio al la estona okaze de la centa datreveno de la aŭtoroj.

Ankaŭ nun ni aperigas du listojn. La unua baziĝas sur unuekzemplaraj vendoj de la koncerna titolo, sekve ĝi spegulas la preferojn de individuaj klientoj. La alia listo registras ĉiujn vendojn, do ankaŭ tiujn al aliaj libroservoj kaj la vendojn en la bergena UK (vd. apartan statistikon en la septembra numero). En ĝi kompreneble ĉefrolas propraj eldonaĵoj de UEA. Antaŭ la titolo staras la vendonombro kaj post ĝi la nuna

vendoprezo. Ĉe la eldonaĵoj kiuj troviĝis ankaŭ en la furorlisto de 1990, la tiama loko aperas interkrampe.

La jaro 1991 estis malpli prospera ol 1990. La libroservo de UEA vendis por 270 500 gld., t.e. 20 000 gld. malpli ol en la antaŭa jaro. Ĉi-jare la aĉetado jam plivigliĝis, kaj sendube ankaŭ la baldaŭa apero de nova katalogo plu akcelos ĝin. Restas tamen la demando ĉu esperantistoj fariĝas ĝenerale malpli legemaj kaj ĉu ĉio eldonita vere estis eldoninda. ob

UNUOPAJ VENDOJ

106	Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld...	57,00 gld.
80	Pasporta Servo.....	18,00 gld.
49	Esperanto-dokumentoj en Esperanto.....	3,00 gld.
32	Etimologia vortaro de Esperanto A-D, E. Vilborg.....	26,70 gld. (8)
26	Internacia komerca-ekonomika vortaro, F. Munniksmä k.a.	48,00 gld.
23	Etimologia vortaro de Esperanto E-Ĵ, E. Vilborg.....	31,80 gld.
23	Sur sanga tero, J. Baghy.....	30,00 gld.
22	La bona lingvo, C. Piron.....	18,00 gld. (1)
22	Proverbaro esperanta, L. L. Zamenhof..	18,00 gld. (19)
21	Fajron sentas mi interne, U. Matthias.	15,90 gld.
21	Viktimoj, J. Baghy.....	27,00 gld.
20	Lingvo kaj vivo, G. Waringhien.....	48,00 gld. (14)
19	Ĉernobil, J. Šćerbak.....	15,00 gld.
18	Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI.....	6,60 gld. (7)
18	Plena Ilustrita Vortaro, G. Waringhien....	172,50 gld. (5)
18	La Sankta Biblio.....	24,00 gld. (13)
18	Kajto, kompakta disko kaj kasedo.	26,10/18,90 gld. (4)
17	Dankon, amiko! C. Piron.....	9,60 gld.
17	La kisa malsano, C. Piron.....	12,60 gld.
17	Nia fundamento sub luepo, G. F. Makkink.....	22,80 gld.
17	Studoj pri la Internacia Lingvo, red. M. Duc Goninaz.....	29,70 gld.
17	Sveda alumeto, A. Ĉehov.....	21,00 gld.
17	Unumane, J.H. Rosbach.....	26,10 gld.

VENDOJ ENTUTE

486	Nova Esperanta krestomatio, red. W. Auld.....	57,00 gld.
481	Pasporta Servo.....	18,00 gld.
367	Esperanto-dokumentoj en Esperanto.....	3,00 gld.
317	Saluton! A. Childs-Mee.....	24,00 gld. (1)
293	Kiel diskonigi vian asocion.....	3,00 gld.
192	Gerda malaperis, C. Piron.....	7,20 gld. (3)
158	Norda naturo, H. Dresen.....	9,00 gld.
156	Plena analiza gramatiko, Kalocsay/Waringhien.....	48,00 gld. (2)
153	Vesperkanto, H. Adamson.....	9,00 gld.
138	Esperanto for beginners, M.C. Butler.....	1,80 gld.
123	La Sankta Biblio.....	24,00 gld. (18)
121	E-dokumentoj en la angla.....	3,00 gld.
120	Faktoj kaj fantazioj, M. Boulton.....	Elĉerpita (12)
118	Proverbaro Esperanta, L. L. Zamenhof.....	18,00 gld. (4)
116	Lingvistikaj aspektoj de Esperanto, J. Wells.....	15,00 gld. (8)
114	Internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI.....	6,60 gld.
111	Tendaraj tagoj, S. MacGill....	12,00 gld.
103	Nixon Esperanto vocabulary... 10,50 gld.	
100	Lasu min paroli plu! C. Piron.....	24,00 gld.
100	Vere aŭ fantazie, C. Piron.....	28,80 gld.



Fundamenta verko pri planlingvoj

Mejdunarodne vspomogatel'nye jazyki (Internaciaj helplingvoj).

Aleksandr D. Duliĉenko. Tallinn: Valgus, 1990, 445p. 22cm. 45,00 gl.

La nomo de la aŭtoro havas tre bonan eĥon inter informitaj interlingvistoj. Aleksandr Duliĉenko (*1941) estas katedra profesoro pri ĝenerala lingvoscienco en la universitato de Tartu (Estonio) kaj specialisto i.a. pri malgrandaj slavaj lingvoj. Li do apartenas al la malmultaj profesiaj lingvistoj kiuj ne nur foje kaj ankaŭe okupiĝas pri interlingvistiko, sed tre profunde kaj kontinue pliriĝas la fakan literaturon pri tiu ankoraŭ tro neglektata scienca branĉo. Li estas sendube unu el la plej gravaj nuntempaj interlingvistoj, kvankam la ruslingveco de multaj el liaj verkoj iom malhelpis lian merititan diskonigon. Duliĉenko i.a. estas konata kiel redaktoro de la altnivela serio *Interlingvistika Tartuensis*, de kiu jam aperis la 7-a (!) volumo (1990). Li organizis interlingvistikajn konferencojn kaj kontribuas al la edukado de la juna (ek)s-ovetia interlingvistika generacio. La recenzata verko verŝajne estas lia ĝisnuna plej granda fostroreĉo, la frukto de kelkjaraj reserĉado.

Kiu antaŭ la Duliĉenka verko vere

povis iom realisme respondi la demandon pri la nombro de planlingvaj projektoj? Couturat/Leau (1903/1907) prilaboris 75 sistemojn, Guérard (1922) mencias 106, Stojan (1929) listigas ĉ. 350, kaj Drezén (1931) 370. Monnerot-Dumaine (1960) kun 382 ne multe progresis. Kaj ankaŭ la teksto de Janton (1973) pri 500 ne estas tre bazohava. Plej realisme divenis (?), jam en 1969, Mario Pei, kiu indikis 1000! Kaj ĉiuj menciitaj estis (-as) informitaj interlingvistoj. Ni pardonu al la ĉirilate nekleraj lingvistoj kiel Akulenko (1971), kiu supozis 200 sistemojn, kaj Haarmann (1973), kiu en tre supraĵa studo proponas entute nur 20 projektojn por la 19-a kaj 20-a jarcento. Nun ni estas pli saĝaj. Duliĉenko entreprenis la zifizan laboron kolekti ĉiujn al li alireblajn faktojn pri ĉiuj ie menciitaj, priskribitaj aŭ eĉ nur cititaj projektoj. Li parolas pri "helplingvoj", termino en la rusa literaturo pli ofta ol "planlingvo", sed celas la lingvajn sistemojn konscie kreitajn de la homo. (Ĉetere, ankaŭ la angla povas funkcii kiel "helplingvo", do restas la postulo

al pli klara kaj unueca interlingvistika terminologio.)

La manuskripto estis preta jam en 1973 kaj devis longe atendi la eldonon. Pro tio la materialo bedaŭrinde tute ne estas ĝisdata. Tamen, almenaŭ ĝis 1973 ni nun havas tre precizan super-rigardon pri la bunta mondo de la planlingva kreado. Entute aperis, laŭ la registro de la aŭtoro, 912 sistemoj. Do, eble, oni nun povas taksu kun pli da motivo (ol povis Pei antaŭ du jardekoj) la nombron ĝis hodiaŭ je eble 960-980 sistemoj. Bedaŭrinde mankas revuoj (kiel sisteme *International Language Review* aŭ *Union*, pli poste *Planlingvistiko*), kiuj ne nur registras la novajn projektojn sed certgrade ankaŭ stimulus debutantojn en la projekto-fabrikado. Eble la informilo *vidpuni* (Rick Harrison, Orlando, Usono), aperanta ekde 1991, povos fariĝi tia.

La libro de Duliĉenko estas tre zorge strukturita. Ampleksa enkonduka ĉapitro (p. 7-22) informas pri bazaj faktoj de la planlingva movado kaj pri la principoj de la projekto-priskribado. Ĝi ankaŭ donas anticipan super-rigardon pri la dividiĝo de la projektoj tra la jarcentoj, informas pri la utiligitaj fontoj kaj pri la gramatika prezentoskemo de la unuopaj sistemoj, kaj klarigas kelkajn interlingvistikajn terminojn. La libro do ne prezentas kompletan historion de la planlingvo (kiel ekz. provis Drezén, aŭ lastatempe Large kaj ankaŭ mi mem) sed donas kronologian liston. La ĉefa parto (p.

Epilogo al ermita aventuro

Ermitoj kunclebris la majstron, historieto pri la kompletigo de nia pvz. Kioto: Ludovikito, 1992. Iam kompletigota verkaro de L. L. Zamenhof / la lasta kajero. 322p. 22cm. Bind. 57,00 gl.

Tiu ĉi libro estas senrezerva fervora celebrado de Zamenhofa fare de du el liaj meritplenaj, pri la alta valoro de Esperanto profunde konvinkitaj adeptoj. Ilia memdona, multajn jarojn daŭranta laboro por la historio kaj evoluigo de la Lingvo Internacia unuigis ilin, kiuj neniam persone renkontis sin, en harmonian amikecon portatan per la amo al Esperanto kaj per reciproka respekto kaj eĉ adoro.

Apenaŭ ekzistas esperantistoj kiuj ne konas la Plenan Ilustritan Vortaron, kies precipa redaktisto estis Varengeno Gastono, kaj, almenaŭ laŭvido aŭ gazetaraj atentigoj, se eble ne ankaŭ per propra legado, la mirigan serion de la pompaj volumoj de la plena verkaro de Zamenhofo, ĉiuj kompilitaj kaj eldonitaj de Ludovikito. Ili ambaŭ, Varengeno Gastono kaj Ludovikito, estas la "ermitoj", kiujn aludas la titolo de la "lasta kajero". Kaj vere, ili celebras. Kaj ili celebras kune. Kaj ili celebras ne certan Varsoviaan okulkuraciston Zamenhofo, sed ili celebras la majstron. Tiu ĉi vorto en la titolo havas sian pezon. Tre konscie ili uzas tiun honorigan nomon, kiun Zamenhofo mem tute ne voĉis toleri rilate sian propran personon. Ĉiu esperantisto, kiu sentas eĉ nur iomete da sciemo pri la vivo kaj la laboro de la du letterskribintoj, tie ĉi trovas legaĵon

pri kiu eble li sopiras, legaĵon pri rara intimeco, interkomprenemo kaj envidinda amikeco. La libro aperis preskaŭ senpere post la forpaso de Varengeno, kiu lasis la amikon dolorige tuŝita en soleco. Tion klare montras, tuj post la titola paĝo, la belaj dediĉovortoj per kiuj la libro uverturas. Ludovikito nomas sian amikon sia verkfarito. Li parolas pri "por ĉiam bedaŭrita patriarko de Esperanto, kiu bonvoladis honori lin per siaj amikeco profunda kaj gvidado majstra". Oni fakte tre bone povas diri ke Varengeno estas gvidanta Ludovikiton. Li certe estas gvidinta lin per lingvaj kaj ankaŭ ĝeneralaj konsiloj, sed tamen forta gvidado eliris ankaŭ de la dek sep jarojn pli juna Ludovikito, kiu per ĉiam novaj ideoj, planoj, esploradoj kaj problemoj ne malmulte direktis Varengenojn kaj instigis lin al laboroj, ekprenoj de kontaktoj, esploradoj

24-344) entenas la kronologian prikribon de entute 780 sistemoj (de la 2-a jarcento ĝis 1973). La indikoj, laŭ la disponebla materialo, estas tre diversaj laŭ amplekso. La aŭtoro klopodis sekvi jenan strukturon en la artikoloj: jaro de la apero, numero de la projekto en la listo, nomo de la projekto, aŭtoro, lando, eldonloko, ĝeneralaj informoj pri la lingva strukturo kaj pri la eventuala propaganda movado(eto), tekstospicimeno, bibliografaj indikoj. Aldona ĉapitro (p. 345-371) entenas informojn pri 132 nebone dokumentitaj projektoj. Tie ni ekzemple trovas (p. 347) mension de la sistemo *Semante* sen aŭtoro kaj aliaj fidindaj informoj, aŭ de *Panromance* de Stefan George. Intertempe certe ankaŭ Duliĉenko informiĝis pri la aŭtoro de *Semante* (Kulik, 1973) kaj legis la eseon pri i.a. la lingvo de Stefan George kiun verkis Verloren van Themaat en *Planlingvistiko* n-ro 11.

La lasta parto de la verko entenas kelkajn ege utilajn registrojn, kiuj ebligas interesajn konstatojn. La kronologia indekso (p. 373-390, nur la jaroj, ĉiu kun la listo de la tiamaĵ projektonomoj) ekz. malkovras ke en la jaro de Volapuko aperis nur unu plia projekto. Sed samtempe kun la skizo de Ludoviko, en 1887, aperis jam 8 konkurencaj projektoj. En 1887-1973, do post Esperanto ĝis la redaktofino, aperis pli ol 600 projektoj, preskaŭ 70% de ĉiuj registritaj planlingvaj sistemoj. Sekvas tabelo de la projekto-nomoj (p. 392-402) laŭ cirila

kaj latina alfabetoj. La aŭtoro nomaro (p. 402-414) malkovras al ni kelkajn aparte produktivajn fabrikantojn (ekz. nia René de Saussure kun 10, Molee kun 8, Bond, Lott, Weferling kaj Weisbart kun po 6, Hendersen kaj Lallemand kun po 4 sistemoj). Ankaŭ la registro de la projektoj laŭ la devena lando (p. 414-425) prezentas surprizojn. Po unu planlingvo-aŭtoro devenis i.a. el Gvatemalo, Panamo, Filipino kaj suda Vjetnamio. La gvida lando estas Francio (151 projektoj), Germanio (inkl. Okcidenta Berlino kaj FRG postmilite; en GDR ne aperis - ? - projektoj) kun 136 sekvas, la trian lokon okupas Usono (98), poste venas Britio (84) kaj Sovetunio (82). La aŭtoro krome prezentas listojn apartajn de projektoj kun ŝufiĉaj tekstoj, resp. de projektoj nur en manuskripta formo (p. 425-429). Sekvas bibliografio kun ĉ. 150 titoloj (kompreneble mankas preskaŭ du jardekoj da prilingvalingva literaturo) kaj listo de 30 interlingvistikaj periodaĵoj. Resumo en la estona, franca, germana kaj en Esperanto (sed ne en la angla, kial?) helpas al nesciantoj de la rusa bazan orientigon en tiu valora trezorejo.

La eldonkvanto bedaŭrinde estas nur 1000 ekz. Estus ege dezirinde esperantigi la tutan verkon. Same dezirindas kompletigo, ja lastatempe aperis tuta aro da novaj plantoj en la planlingva ĝardeno, inter ili tute interesaj, kiel 1978: *Glosa* (R. Ashby/W. Clark), 1979: *Sprache 2000* (Lothar Hoffmann), 1981: *Vikto* (Vilmos

Bösz), 1984: *Adli* (A. Piras), 1986: *Uropi* (Joël Landais), 1989: *Unitario* de Mario Pleyer (= Rolf Riehm), kaj 1990 (?): *Vorlin* de Rick Harrison. Ĉu la aŭtoro verkos aldonon? Ni esperu!

La libro de Aleksandr Duliĉenko estas alvoko al kompletigo, al forigo de ĉiuj mankoj, neceviteble enestantaj. Ĝi estas fundamenta verko por la sistema esploro de la planlingva fenomeno.

Detlev Blanke (Germanio)

BIBLIOGRAFIO

Akulenko, V. V. "O preodolenii jazikovogolj barjera". In: *Buduŝeĉje nauki*, Moskvo, 1971, Nr. 4., p. 352-365.

Couturat, L. kaj Leau, L. *Histoire de la langue universelle*, Paris, 1903.

—. *Les nouvelles langues internationales*, Paris, 1907.

Drezen, E. K. *Historio de la mondo-lingvo*, Leipzig, 1931.

Guérard, A. *A short history of the international language movement*, London, 1922.

Haarmann, H. *Sprachenregelung. Grundfragen der Sprachenregelung in den Staaten der Europäischen Gemeinschaft*. Hamburg, 1973.


Janton, P. *L'espéranto*, Paris, 1973. Monnerot-Dumaine, M. *Précis d'interlinguistique générale et spéciale*, Paris, 1960.

Pei, M. "Wanted: a world language". *International Language Reporter* 15, n-ro 52, p. 4-8.

Stojan, P. E. *Bibliografio de Inter-nacia Lingvo*, Genève, 1929.

vizitoj, kiuj eĉ postulis okazajn ferovojajn lokoŝanĝojn, vizitojn al historiistoj, al bibliotekoj aŭ aliaj dokumentejoj. Kelkafoje Varenĝeno senkulpigas sin pro leterprokrasto, plendas pri sia aĝo, sed tamen ĉiam denove helpas laŭ siaj ebloj kaj liveras tion pri kio Ludovikito petas. Sed, miraklo! Ankaŭ tiu ĉi plendas pri la maloportunaĵoj de la aĝo, pri seniligo kaj progresanta kadukeco. Tre ĉarme li faras tion. Ruzema bubo li estas. Li ofte plendas ne forgesante aldoni certan porcion da memironio, kaj la leganto restas iomete malcertigita pri la grado de la sincereco kun kiu parolas Ludovikito, kiu fine ŝajnas senkulpiĝi sin eĉ pro siaj senkulpiĝoj.

Kio nun okazas en la menso de la ekinteresiĝanta leganto? Li scias ke tiun ĉi leter-interŝanĝon estas skribinta la vivo mem, ke li fakte akompanas du elstarajn esperantistojn dum



Amikoj kiuj neniam vidis sin: Waringhien kaj Ludovikito

ses jarojn en iliaj ĉiutagaj zorgoj kaj vivotedoj. Li anticipe eĉ scias ke tiun amikecan interrilaton estas senkompatate kaj bruske finonta la morto. Per la lasta letereto de la unue forpasanta ermito la historia idilio de la du diligente kaj abnegacie



laborantaj kleruloj kaj sciencistoj abrupte ŝanĝigas en amaran akualecon. La leganto kiu eble, por tiel diri en tempoakcela filmado, dum tri tagoj aŭ tri semajnoj estas kunvivinta kiel muta atestanto sesjara tempoŝpacon, subite konsciigas ke li estas fariĝinta kvazaŭ tria amiko. Li ne povas ne kunsenti la aflikton kiu estas trafinta la postvivanton. La tre dista – inter Parizo kaj Kioto – konversacio ĉiam estas restinta amika. La du amikoj estas ŝerce reciproke sin provokintaj. Ili mildaforme eĉ estas riproĉintaj sin. La leganto tamen eĉ ne momenton dubas ke tiu ermita kunlaborado estas de rara kaj nekuebla unuanimeco.

En la letero ses Varenĝeno parolas tre kontentige pri sia ĵus sufiĉe glate okazinta transloĝiĝo en novan apartamenton, kaj li rigardas sian leteron kiel festan, per kiu komenciĝas nova epoko. En la letero 138, la lasta, li anoncas novan, tre proksiman transloĝiĝon, kiu rezultos esti lia lasta, definitiva. Inter la du datoj kuŝas la longa kaj detala kompletigo de la *plena verkaro de l.l. zamenhof*. Ĉiam estas ĝi la precipa afero. Ĉio alia estas reduktita al nepre ne ellaseblaj mencioj koncernantaj rimarkojn pri sano, bona farto kaj familio. Eĉ la ĉiam ripetigaĵaj salutvortoj "al vi mem, al via..." aŭ "de mi mem, de mia..."

estas kiel laŭ-ritaj haltopunktoj en la solena celebrado. La mondo ekstere de la du – Pariza kaj Kiota – ermitejoj, kun sia brutala monavideo, ja ekzistas, postulas siajn tributojn. Tion ili agnoskas. Tion ili akceptas kaj ignoras kiel neeviteblajn malbonojn. La tuta leterkolekto tamen efektas kiel artisma kreaĵo de tre konscia beletristo (ne de du beletristoj!), konceptita kvazaŭ de unika menso. Tiom bona estas ĝia aranĝo. Ĝi samtempe tuŝas nian senteman koron kiel nian estetikan senton. Iel restas ĉe ni profunda dankemo al la du eminentaj esperantistoj kaj modelaj amikoj.

Rikardo Sulco (Germanio)

Firma fundamento

De Mickievič al Goethe. De Molière al Šalom-Aleĥjem. De Moseo al Andersen. Kioto: Ludovikito, 1988. 499+497+497 p. 21 cm. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, parto dua, vol. 2,3,4. Po 48,00 gld.

Fine kelkaj volumoj de la fama PVZ atingis Uralon, kaj ni povas admiri la grandan entreprenon, kiu ankoraŭfoje provas ke iniciatema persono en la Esperanto-kulturo valoras pli ol amasaj organizoj. Kaj unue mi ne povas ne esprimi miajn dankemon kaj respekton al la iniciatoro – ne malpli kuraĝa ol la iniciatoro de nia lingvo.

lingvo bezonis stabiligon de parola tradicio. Kaj kiom mi povas ĵuĝi el la originaloj, do ekzemple *La revizoro* de Gogol brilas ĝuste per tre suka, sprita, leĝera lingvaĵo, kapabla karakterizi homtipojn – stilo kies traduko estas defio por ŝatanto de malfacilaj taskoj.

Pleu apenaŭ troviĝus pli granda kaj

Sed kial? Klarigante siajn ideologiajn konstruajn strebadojn, koncentriĝintajn en lia Deklaracio pri Homarano, Zamenhof emfazas la neceson de religiaj ritoj unue por la normala disvolvo de sentaro kaj mondkoncepto ĉe infanoj. Kaj kiel la nova religio necesis por enkonduki homon en novtipan transnacion socion, tiel la fabeloj (ne nacia), sed de la mondforma verkisto) evidente necesigis por adoptiti al infano la transnacion lingvon. Tiele ni povas supozi en Zamenhof la unuan "denaskiston".

Nu, kaj la Esperanta Proverbaro

grava tasko ol la traduko de la *Biblio*, kiu estas bazo de la nuntempaj eŭropaj kulturo kaj arto. Pentateŭko, la Psalmaro, la Sentencoj de Salomono, la mensturmenta Predikanto – t.e. la tekstoj de la Malnova Testamento kiuj estis konataj al la iniciatoro en la originalo. Li mem motivas siajn intencojn en la antaŭparolo: "Neniu libro estas tiel konata en la tuta civilizita mondo... Neniu libro havas en la tuta civilizita mondo tiom multe da adorantoj... Neniu libro havis en la historio de la homaro tiel grandegan signifon kiel la Biblio..." Krome, "por la plimulto de la nuntempaj kulturaj lingvoj la Biblio estis la ĉefa bazo, sur kiu la lingvoj literaturigis kaj disvolvigis..." Do, ankaŭ por Esperanto tio validas, kaj ĝi povas esti uzata didaktike, "ĉar ĉiu povas tre facile havi la tradukon de la Biblio en sia nacia lingvo kaj komparadi ĝin kun la traduko esperanta..."

Kaj la sekva paŝo estas fabeloj de Andersen – monde konata fabelisto.

ankoraŭfoje provas lian celon *animi* la lingvon. Pli ĝuste, por li la lingvo estis nur fundamento de la konstruota nova spirita mondo de la homarana socio. Tiel ni povas esplori kaj kreskigi la briktaŭlojn de la konstruata Templo, fundamentita de Zamenhof ĉirkaŭ la akso de *lia* interna ideo. Inter la tradukaj troviĝas ankoraŭ iom da ordinara beletra, kiu okupas jam sekundaran pozicion en liaj kulturpolitikaj prioritatoj. Tiele mi vidas ne supertaksebla la iniciatoro de l'ro Kanzi, doninta riĉan kaj facile akireblan dokumentan bazon por sekvanta esplorstoj de la zamenhofa penso.

Nikolai Lozgačev (Ruslando)

ĜUSTIGO

En marto (p. 59) ni miskribis la nomon de Bruno Gröning. Ni pardonpetas.

Evento en la Esperanta gazetaro

Ĉu iu el Vi ankoraŭ ne ricevis informon pri la ekapero de la "Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado", *Evento?* Apenaŭ kredeble, ĉar ĝiaj hungaraj eldonantoj lanĉis senprecedente ampleksan abon-kampanjon ... kaj ĝis nun ili tenas sian promeson pri dusemajna, akurate aperanta, informiĉa periodaĵo, kiu ankaŭ represas artikolojn alie malfacile alir-blaajn.



Evento en Centra Eŭropo

"La apero de ni, esperantistoj, estis kaj restis *negocio de la naciaj kadroj*, kiuj fine de la pasinta jarcento jam montriĝis tro malvastaj. Estas do paradokse ke ni ankoraŭ estas organizitaj, antaŭ ĉio, *nacie*. En tia strukturo estos malfacile 'faligi la naciajn murojn', kiuj disigas la popolojn, precipe nun, kiam neimageble fortiĝas *nacismo*, kiun Waringhien nomis 'pesto de la nuna mondo'.

Por ni la naciaj kadroj estas tro striktaj, ni volas spiri vaste, translime. Nun, kiam la naciaj bultenoj ne povos daŭre ekzisti parte pro financaj, parte pro ideaj kialoj, ni devus per ambaŭ manoj kapti la okazon fari la revuon *Eventoj* komuna periodaĵo de la *tuta centra regiono de Eŭropo*."

Geza Kurucz (Hungario)



Kiel jene: verdaj monstroj tamen homecaj

La varia *Info*, revuo de Itala Esperantista Junularo, lastatempe ĉiam havis eĉ beltran rubrikon. Nun la "aktivuloj kaj eksaktivuloj de IEJ" elmontris sian intiman flankon en "senpretenda antologio de originalaj poemoj" *Kiel jene* (havebla ĉe la Libro-servo de UEA).

Frequencies: Esperanto je kataluna frekvenco

Héctor Alòs kaj liaj amikoj ne kontentigis modernigi la tre legindan *Kataluna Esperantisto*: ili ankaŭ lanĉis la katalunlingvan, trimonatan *Frequencies*, kiuj deziras pludoni al ne-verduloj informojn riceveblajn per Esperanto. En la ĝisnunaj du numeroj ĉerpaĵoj precipe el *Etnismo* kaj *Kontakto* traktas temojn ĉefe pri etnoj kaj minoritatoj, interesajn por la katalunoj, etnisme tre konsciaj. (Redakcio: Apartat de correus 1.163, E-08300 Mataró)

Malmeloneme

"... ankaŭ eksterduoninsulanoj povas lerni el *Frequencies*. Ni vidu kiel. Unue etrekigu la septembrajn numerojn de *Esperanto* de la jaroj 1989 kaj 1990. Rigardu la kovril-foton de la unua kaj la foton sur p. 158 de la dua. Kion vi vidas? Oni himnumas, esperumas. Sur la 12-a paĝo de l'unua numero de *Frequencies* similan foton, probable el la varsovia kongreso, la redaktistoj komparas kun bildo de la templo-salono de Atestantoj de Jehovo (v. apude). Aŭ, mi aldonus, de la Ĉina Komunista Partio. Kaj la vida efiko samus, se pendus toteme *la melono* anstataŭ la verda (enfote nur nigra) stelo. Aŭ ĉu ni enpaŝu en novan jarmildan kun tia, pasintjarcenta puca, muciada aspekto?"

Georgo Kamaĉo (Hispanio)

Malnova revo, nova provo

Estas ĝenerala konsento ke la diversaj reformemuloj en la Esperanto-movado malsukcesis i.a. pro sia nekapablo unueciĝi pri la farendaj ŝanĝoj en la lingvo. Tion volas ŝanĝi la revueto *Nova provo*, kies unuaj du numeroj estas jam aperintaj. En ili partoprenantoj el Belgio, Britio, Francio, Galegio, Israelo, Italio kaj Usono prezentas siajn proponojn, plej ofte per paralelaj tekstoj: "normala" Esperanto live, kaj versio reformita laŭ iliaj ideoj dekstre. **NOVO**, "Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia", akceptas kontribuojn ĉe Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando.

Juna amiko: ekspedaj festoj...

...kvarfoje jare okazas ĉe Stefan MacGill en Budapeŝto. La redaktoro de tiu ĉi lernejana revuo mem trenis en pezaĵ sakoj la lastan numero de decembre de la pasinta jaro al la poŝticejo: kiel vera Sankta Nikolao aŭ Paĉjo Kristnasko! Malgraŭ la abonkvanta falo en 1991 (de 3800 al 2300, ĉefe pro malfaciloj en Orienta Eŭropo), infanoj povos plu ĝui en pli ol kvindek landoj la alvenon de ilia *Juna amiko* en ĉiu tria monato. Ĉar post la rezigno de Hungara E-Asocio nun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj transprenis la eldonkostojn. Pri abon-rabatoj pro-kvantaj sciĝu ĉe: *Juna amiko*, Pf. 193, H-1368, Budapeŝt, Hungario.

Kiu faras kion en Mozo?

La 125-a numero de *Meuse économique*, magazino de la Komerca kaj Industria Ĉambro de la Departemento Mozo (Francio), estas speciala: sur 104 paĝoj ĝi prezentas la produktojn kaj entreprenojn de tiu regiono france, germane, angle – kaj Esperante. Mendebla por 10 irk ĉe la adreso de la Ĉambro: 6 Parc Bradfer, F-55000 Bar-le-Duc, la luksa eldono utilas ne nur al komercistoj, sed eĉ al lingvemuloj: esprimojn kiel "giso alojita" aŭ "kribruma presadprocedo" Vi trovos ĉi tie!





El abismo

Nun multaj esperantistoj en aliaj landoj eble ne ricevas respondon de estonoj, kaj ne komprenas la kaŭzon de la silento. La inflacio fariĝis netolerebla en nia lando. Pasintjare simpla letereco eksterlanden kostis 15 kopekojn, nun jam 20 aŭ 40 rublojn.

Por mi ĉio tio estas terura katastrofo, kio de mia tuta E-vivo, tuta agado, de miaj kontaktoj kun sinceraj amikoj en multaj landoj. Mi estas mizera kaj malfeliĉa. Esperanto estis mia vivo, nun mi kvazaŭ falis en nigran puton, de kie ne eblas eliri.

Antonina Apollo (Estonio)

Ni bezonas pacmovadon sed ne MEM

Post la "puĉo de Hamburgo" la novaĵ gvidantoj de UEA ne povis forgesi la efikajn servojn de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM). Pro tio ankaŭ ili kulpas ke dum pluraj postaj jaroj MEM povis vivi kaj agi damaĝe en nia medio. Estus bone se tion konfesus almenaŭ tiuj kiuj eksentis sian misfaron! Nur tiel oni povus rapide revivigi la pacmovadon, kiun MEM – per sia direktiva agado – konstante sufokadis. La pacmovadon oni bezonas, sed ne plu tian kia estis MEM.

Bojidar Popoviĉ (Jugoslavio)

Ni bezonas nek MEM nek pac-movadon

En la decembra (1991) n-ro de "Esperanto", N. Aleksiev vokas al fakta revivigo de formortinta, kune kun Soveta Unio, MEM. Mi ne diskutu ĉu aparta E-pacmovado estas bezonata. Mi opinias ke tamen ne; ke ĉiu esperantisto estas zamenhofano, pacifisto, kaj strebas al tutmonda paco. Sed mi malsamopinion kun s-ano Aleksiev. La lasta frazo de lia intervjuo: "La GOLF milito kaj la lokaj milit-konfliktoj pruvas la neceson de vigleco fare de la pacamaj movadoj" – igas min pensi. Ĉu, laŭ soveta modelo, la "pacbatalantoj" devintus protesti por ke la armeo de UN ne eniru la Golfon – aŭ, male, protesti en Bagdado, por ke Saddam tuj foriru

el Kuvajto? Mi dubas ke pri la ebleco de ĉi-lasto kredas eĉ la intervjuito mem.

Alexander Karkovsky (Usono)

Glosa al Voso

Komentante la Proklamon de Voss kaj la Manifeston de Raŭmo, Stefan MacGill re-esprimis almenaŭ unu gravan falsan aserton (dec. '91): ke la lasta estas oficiala dokumento voĉdonita de la Komitato de TEJO. Tamen, io alia evidentiĝas el ĝia antaŭteksto, elskarita de la redakcio ĉe la aperigo (okt. '91). (Red.: Vd. ĝin nun ĉi-sube.)

Tamen, mi sentas ke ne necesas aparta polemiko, se ni startas el la fakto ke Giorgio Silfer kaj Stefan MacGill rajtas revu malsamajn revojn. MacGill revuas mondon kie ĉiuj kelneroj kaj hotelestroj alparolu fremdulon en esperanto, kie EK adoptos esperanton, kie nia lingvo estos deviga lernobjekto. Silfer revuas mondon kie anstataŭ kelkcento da efektivaj esperanto-familioj estos centmilo. La diferenco inter la finvenkismo kaj la raŭmismo esence situas tie ĉi: ne en la ridinda aserto ke raŭmistoj ne volas varbi esperantistojn. MacGill rajtas peni, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj premu ĉe la institucioj; Silfer rajtas labori, por ke ju pli multaj ni estus, des pli multaj vivu nian vivmodelon. MacGill rajtas revu ke iu mikrosocia idealo transiru al makrosocia realo; Silfer rajtas revu ke la makrosocio ne malhelpu la kreskon de ideala mikrosocio.

Giorgio Silfer (Eŭropo)

Ni ŝanĝu nin mem!

Prave s-ino J. Philips skribas en "Reagoj" (jan. '92) ke "por pli-popularigi Esperanton, ni devus aŭ ŝanĝi la homan emon, aŭ krei pli da mongajn eblecojn por E-parolantoj". Ĉar estas utopie ŝanĝi grandskale la homan emon, ni nepre strebu uzi E-on ankaŭ utile, fakcele. Ĝis kiam eblos gajni monon per E-o, mi timas ke E-o restos nur kluba amuzilo, sen intereso por la vasta publiko.

Germain Pirlot (Belgio)

Ni kreu alternativejojn!

Rilate al la dilemoj de s-anino Joan Philips, mi demandas ĉu la esperantistaro ne povus sekvi la ekzemplon de iuj grupoj kiuj provas establi t.n. "ekologiajn vilaĝojn". Ĉu ni ne povus krei reton de vilaĝoj, kie konstante loĝus homoj el ĉiuj profesioj kaj vivostatoj? Ebla elirpunkto por tiaj komunumoj povus esti la ĉirkaŭaĵoj de jam ekzistantaj E-centroj. Rimarku ni la grandan nombron da komunumoj en la mondo (religiaj, kibucaj, verdulaj...), kiuj sukcesis kaj daŭris.

Garvan Makaj' (Irlando)

Red.: En Usono jam okazas provo krei tian Oazon de Esperanto (P.O.B. 1538, Garden Grove, CA 92642). Vidu artikolon en jul-aŭg. 1991.

Miksitaĵ magiaĵoj


En la prezento de Internacia Festivalo (jan. p.8) erare kunligiĝis la mencio pri la magiaĵoj de Milda Krivickaite (tial: *Mildaj* Magiaĵoj), en la aparta porinfana programo, kaj tuj pri la programo *Hej, ni faru mondojagŝon!* de Christoph Müller, dum la Magia Vespero. Honoron al kiu ĝin meritas!

W. F. Huppertz (Nederlando)

Enkonduko al la Manifesto de Raŭmo

Ĉi tiu dokumento ricevas la nomon de la urbo, en Finnlando, kie oni debatis, okaze de la 36a Internacia Junulara Kongreso (1980 07 25 ĝis 08 01), la temon "Esperanto en la 80aj jaroj: celoj kaj metodoj". Ĝi ankoraŭ ne esprimas la oficialan opinion de TEJO kiel organizo, sed nur de tiuj, individuoj kaj grupoj, kiuj subskribis aŭ subskribos ĝin. La originalo de la Manifesto troviĝas ĉe FEJO (Finnlanda Esperantista Junulara Organizo), kiu akceptis aliĝojn en skriba formo ĝis 1980 12 31. (88 subskriboj)

(Kontakto, 1981/1)



Britio: Kastelo lanĉas gvidfolion

La plej vizitata kastelo en Nord-Anglio, Skipton, lanĉis la okan, Esperantlingvan version de sia gvidfolio la 7-an de marto. Ĉeestis 20 esperantistoj el ĉiuj partoj de Anglio, el Germanio kaj Moskvo. (G. Greatrex)

Francio: Informado lande, regione kaj loke

Omage al la 75-a mort-datreveno de Zamenhof, la grava radio-kanalo France-Culture dissendis, inter la 13-a kaj 17-a de aprilo, kvin-eran serion da 20-minutaj programoj pri la historiaj, movadaj, lingvistikaj kaj aliaj aktualaj aspektoj de Esperanto. Invititaj babilu kun la program-estrino Cécile Descubes estas Pierre Janton, Claude Piron, Claude Gacond, Michel Duc-Goninaz kaj Henri Masson.



Amikeko: Valenten-taga donaco por la internacia semajno

Proklamante dum la 14-a de februaro la naŭan Internacian Semajnon de Amikeko en Otavo, la urbeŝtrino Jacqueline Holzman agnoskis Esperanton "kiel nesuperblan interfunkciantan rimedon por tutmonda kultura disvolviĝo". (M. Campagna)

Samokaze Richard M. Daley, urbestro de Ĉikago, alvokis al "rekonjo kaj akcepto de Esperanto kiel tutmonda dua lingvo".

En Gotenburgo (Svedio) ĝuste tiusemajne oni festis 100-an datrevenon: en 1892 fondiĝis la unua klubo en la urbo. Por kunfesti gastis A. Pettyn (Pola Radio) kaj A. Junusov (Dagestana Televido). Junusov vizitis en la biblioteko de la proksima urbo Kungälv la ekspozicion "Lingvaj problemoj en Eŭropo kaj EK", por kiu pretiĝis la sveda traduko de la broŝuro "Komunikado en Eŭropa Komunumo 1992". En la foto supre videblas Martha Andreasson kaj Abdurahman Junusov. (M. Andreasson)



"Kopiado estas ne nur permesata, sed ege konsilata" – ni legas dorsepaĝe de la franclingva broŝuro "Esperanto – faktoro de la eŭropa estonteco", kiun la loka E-centro (7 rue Major-Martin, F-69001 Lyon) vastaskale disdonas en la liona regiono. (J. Filleul)

Ĉe la Unesko-klubo de Gargas ĝis la 16-a de junio estas vizitebla ekspozicio de infan-desegnaĵoj, pri la temo "Akvo kaj muziko", kies materialon Madeleine Gibež kolektis helpe de diverslandaj UEA-delegitoj. Kontakto ŝin por ekscii la temon de la venontjara desegnaj-konkurso! (6-Foyer-igt. "Les Trois Ages", F-84400 Gargas)


Tanzanio: Kontakto klubojn, kreskigu kunvenon!

Krom la klubo de la ĉefurbo Dar-es-salamo, nun ekzistas deko da aliaj tra la landego. La unua tutlanda kunveno okazos en la ĉefurbo, inter la 4-a kaj 11-a de julio. Eksterlandaj vizitantoj estas tre bonvenaj. Pri konkretaj kontakt-eblaj volonte informas la komisiito de UEA pri rilatoj kun Tanzanio, Anita Dagmarsdotter, Mariehamnsgatan 19, S-164 79 Kista, Svedujo.

Persone



Ĥejr-Ĥah: Notoj el Ĉina taglibro



La irana aktivulo Reza Ĥejr-Ĥah daŭrigas sian azian instigvojaĝon. En novembro li helpis instruante en la provinco Guangdong, proksima al Honkongo, vigligi la vivon de la 60-membra Esperanto-Asocio de Zhongshan (adreso de la asocia sekretario por saluto, korespondoj kaj sendaĵoj: s-ro Li Zhongping, Room 103#, building no.8, Xianhuanian str. no.10, Zhongshan, CN-528402) kaj reaktivigi la rondon en Shenzhen (prezidanto: S-ro Du Shou He, 2nd floor, Luohu building, Jianshe Road, Shenzhen). En decembro, cele al starigo de kurso, Reza prelegis al 70 studentoj en Chengdu, ĉefurbo de la provinco Sichuan.



Polgár: La plej juna grandmajstro

En la hungara familio Polgár ĉiuj estas esperantistoj – kaj ĉiuj tri filinoj, Zsuzsa (22),

Zsófia (17) kaj Judit (15) famaj ŝakistoj. En decembro, ŝakturniro en Budapeŝto alportis por Judit la rangon de grandmajstro. Akirante ĝin, ŝi ekigis la agrekordon de Bobby Fischer, kiu iĝis grandmajstro en 1957, ŝi monatan malpli juna. Laŭ ekspertoj ŝi havas bonan ŝancon, jam ene de kelkaj jaroj, por mondĉampioneco. (Humphrey Tonkin)

Stop-Bowitz: Reĝa Ora Medalo



Dum festena kunveno de la Klubo Esperantista en Oslo, okaze de ties 75-jara jubileo, oni transdonis la Reĝan Oran Medalon al Carl Stop-Bowitz. Li ricevis la medalon kiel rekonon kaj de lia scienca laboro pri zoologio kaj de lia longedaŭra kaj multflanka agado por Esperanto, i.a. kiel prezidanto de Norvega Esperantista Ligo (1947-1977), vicprezidanto de UEA (1974-1986), prezidanto de ISAE kaj de la Someraj Universitataj Kursoj, grava kunlaboranto de PIV kaj de Esperanta bibliovartaro. (Norvega esperantisto)

Oficiala informilo

DONACOJ 1992 (gld.) gis la 31-a de marto

FONDAĴO AFRIKO: Belgio: L. Drèze 100,00; S. De Weerd 12,00. Finnlando: H. Tielti 78,04; I. Klemola 3285,25; S. Kauppinen 114,78; T. Sormunen 500,00. Germanio: W. Heinrich 562,50; U. J. Moritz 379,20. Hispanio: H. Gil Alvarez 29,00. Italio: Ricagno Graciano 73,00. Nederlando: Fam. Bossong 39,75; A. J. ten Hagen 1000,00; B. Muizelaar 100,00. Pollando: K. Babiarz 27,12. Svedio: B. Haugen 30,87. Anonime 100,00. Sumo ĉi-jara 6431,51.

FONDAĴO AMERIKO: Argentino: E. Ba-lech 27,66. Brazilo: R.F. da Silva 22,57. Sumo ĉi-jara 50,23.

ASOCIA KAPITALO: Britio: A. Venture 4913,25. Kanado: B. Salt 6033,00. Sumo ĉi-jara 10 946,25.

FONDAĴO AZIO: Finnlando: I. Klemola 2053,53.

BELARTA FONDAĴO: Heredajo Warin-ghien 6543,96.

BJALISTOKA ESPERANTO-CENTRO: Nederlando: F. Zeiler 75,00.

BIBLIOTEKA FONDAĴO: Finnlando: I. Klemola 644,48; S.S. Mynttinen 302,25. Germanio: H. Erhard 112,45. Nederlando: W.A. Verloren van Themaat 20,00; M. Abbas 335,00; B.M. Slösser-Bresler 25,00; F. Zeiler 25,00; L. Adelaar 60,00. Sumo ĉi-jara 1524,18.

Esperanto, turismo kaj aera sporto. Vi ŝatas interrilatojn. Vi ankoraŭ plezure dezirus liberflugadi per moderna paraŝvebilo. Spertuloj aŭ komencantoj, venu kun ni malkovri la plej belajn flugad-lokojn en Francio. Neforgesotaj impresoj certigitaj! Familia esperanta etoso dum nekutimaj aŭgustaj ferioj. Pliaj informoj: Esperanto 42, S-ro Stachowicz L., rue Didier Guetton, F-42330 St-Galmier, Francio.

Nova adreso de Mark Fettes: 322 Cumberland Str., Apt. 3, Ottawa, Ont., K1N 2J7 Kanado. Tel. (613) 562-0785.

Ĝe malkomforte sed ne tro koste vi povas tranoki ĉe Verda Lundo, 228 Capwirth Street, London GB E10 7HL. Petu informilon!

Mi serĉas devotek-libretojn tiel Kiel malnovajn poŝtkartojn (pejzaĝojn kaj urb-vidajojn) de antaŭ la jaro 1920. Hubert Magis, Zeelputten, 4, B-2200 Herentals, Belgio.

Georgo Kamaĉo havas novan telefon-numeron: +34 1 373 74 95.

Se vi interesiĝas pri aligo al fakasocio pri lingva reformo, skribu al Novo, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando.

FONDAĴO CANUTO: Britio (por rusaj e-istoj): L.A. Wrigley 90,04. Finnlando: por estonaj e-istoj: K. Ekman 127,32; A.L. Heikkinen 172,50; M. Hokkanen 8,21; T. Grundström 8,16; S. Hämäläinen 25,46; A. Kanninen 92,41; A. Kytä 8,21; M.M. Linjama 77,50; E. Pynnönen 102,68; R. Rannisto 24,64; U. Rantanen 30,80; R. Sabelli 108,43; A. Selonen 20,54; L. Teräntö 20,53; H. Veijanen 20,54; por rumanj e-istoj: H. Tielti 78,03. Germanio: R. Terjunj 13,50. Japanio (por aziaj e-istoj): M. Asami 50,46; I. Hukusima 50,46; T. Inde 56,06; Y. Isino 28,97; M. Itabasi 126,14; T. Itabasi 25,23; N. Kato 25,23; T. Matumoto 28,03; Y. Misawa 84,09; S. Miyamoto 56,06; S. Mizuno 50,46; Z. Nagaoka 50,46; T. Nisio 50,46; K. Nomura 28,03; T. Nomura 25,03; S. Okutu 50,46; T. Oohara 28,97; S. Oonisi 14,01; Z. Sibayama 56,06; H. Sugiyama 25,23; T. Suzuki 50,46; H. Takahasi 28,03; H. Takubo 50,46; R. Tokuda 28,03; H. Yamaguti 25,23; Y. Yamaguti 25,23; Y. Yoneyama 25,23. Nederlando: E. Maasbommel 250,00; F. Zeiler 88,00. S.v. Wijngaarden 100,00; M. Fettes 13,40. Por ĉiuj e-istoj: W.C. Keizer 50,00; R. Moerbeek 100,00. Ruslando: A. Ananjin 48,00. Sumo ĉi-jara 2907,90.

GENERALA KASO: Britio: D.B. Gregor 32,31; R.C. Hoather 80,25; B. Najbaro 16,05; A.D.N. Pitt 22,00. Germanio: H. Demters 134,88; J. Weidacher 22,49; G. Kalkhof 56,22. Kanado: M. McCall 154,00;

Tarifo: Ĉiu vorto de la anoncetoj kostas 1,40 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri ilia enhavo ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton por la ripeto de anoncetoj. Por la tarifo de anoncetoj, bonvolu vidi la kolofonon.

Anoncetoj

49-jara rumana filologo, ekonomiisto korespondus tut-Eŭrope. Rodica Turcanu, Sos. Colentina 10, Bl.6 Sc. D. et. 10. ap. 176, București, RO-72262 Rumano.

Praga trietaĝa loĝejo en Ĉeĥoslovakio. Duobla + 3 apartaj litoj, 2 banĉambroj, kuirejo. Apud bus-kaj metro-haltejo kaj urbocentro. Luigas US\$20/nokte minimume 2 semajnojn. Pensio Belant, 5008 "N" St., No. 204, Sacramento, CA 95814, Usono. Tel. 916/446-7752.

Uzitaĵn telefonkartojn deziras interŝanĝi tutmonde Jan Torfs, Vrijgeweide 27, B-2140 Borgerhout, Belgio.

M. Fettes 250,00. Nederlando: B.A. Cost Budde 12,00. Svedio: G. Tistad 89,47; E. Johansson 10,83. Svislando: W. Giannini 25,26; M. Erbetta 126,28; W. Schaufelberger 35,36. Usono: W.C. Taylor 35,76. Anonime 34,40. Diversaj malgrandaj 24,72. Sumo ĉi-jara 1162,28.

PROPAGANDA KONTO: Belgio: L. Drèze (por UN/Unesko) 50,00.

VOLONTULA FONDAĴO: Nederlando: E. Maasbommel 250,00.

FONDAĴO WÜSTER: Novzelando: (por Scienco) Auckland Esp.Forumo 46,40.

SOCIETO ZAMENHOF 1992

Belgio: Elfriede Ernst. Brazilo: Marija Pozder Almada. Britio: d-ro John C. Wells; Wilfrid G. Atkinson. Finnlando: Irla Klemola; Terttu Österman. Germanio: Elfriede Korte; Elise J.F. Woller; Helmut Welger; Helmut Klünder; Marieta Moschner; Richard Schutz; Peter Weide; Margarete von Waldowitsch. Francio: Jack-André Rousseau; Michel Massenin; Julien Ducrocq. Hispanio: José Franquesa Solé. Italio: Lidia Neri Lami; Vittoria Spina. Japanio: Saburō Yamazoe; Syōiti Satou. Kanado: Dorothy M. Hawley; Merle Haltrecht-Matte; Betty Salt. Nederlando: Joaquin Calado; P.H. Damsté; Sija van Wijngaarden; W.C. Keizer. Svedio: Birger Viggén; K.G. Lennart Lagerkrantz; Lennart Svensson; Nils Gustav Johansson; Sven Sundin; Tomas Jansson. Usono: Charles W. Tustin; Gigi Harabagiu; Thomas H. Goodman. [Forpasinta]: Sin'it'irō Kawamura.

Al ĉiuj tre koran dankon!

UEA

Korespondas tutmonde Petro Peres, Poŝtkoto 2685, BR-80.001 Curitiba, Brazilo.

28-jara e-istino, komercistino pri pajlaj ĉapeloj kaj artfaritaĵoj dez. amikiĝi kun komercist(in)oj tutmonde. Li Yan, Jiang Jin Lu 17, Shashi, Hubei, Ĉinio.

En interkonsento kun Floriade, la internacia Hortikultura Ekspozicio en Zoetermeer apud Hago, ni sendos al vi oficialan faldfoliojn pri Floriade 1992 en la Internacia Lingvo. Petu de Esperanto-Informatie, Dunanstr. 164, NL-2713 VC Zoetermeer, Nederlando.

Iu Esperantisto kiu sendos al mi seriozan informon pri la timo de la PIV-a vorto *hobalo* meritos mian eternan dankon. André Cherpillod, La Blanchetière, F-72320 Courgenard, Francio.

Tri komencantoj: Astrid (8 j.), Torun (11 j.) kaj Gunilla (35 j.) deziras korespond-amikojn el la tuta mondo. Respondo garantiata. Adreso: Jansson, Storg. 13, S-753 31 Uppsala, Svedio.

5 000 Esperantaj libroj kaj broŝuroj por vi! Akireblaj per interŝanĝo. Sendu vian manko-liston kaj oferton al: FAJZL Esperanto-Kolektaĵo, Andrassy út 27, H-1061 Budapest, Hungario.




KONTAKTO*

vi kunparoligas en vian lito

*Junulara gazeto, ankaŭ kun faciligvaj artikoloj.
Ricevu prov-ekzempleron (laŭeble) kontraŭ 2 internaciaj responduoj (haveblaj ĉe poŝtoficejoj) de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


FUNDAMENTA KRESTOMATIO estas denove aĉetebla!



La nova 18-a eldono, printita de prof. G. Waringhien, faras maksimumajn klopodojn tekste reiri al la 1-a eldono de 1903, sed grafike resti ĉe la bela 17-a eldono de 1954. 18 + 446 paĝoj. Tole bindita kun legrubando kaj kromkovrilo. 21cm. ISBN 92 9017 044 1. Prezo: 48,00 guldenoj (32,00 gld. ekde 3 ekzempleroj).

Mendu ĉe la Libroservo de UEA!

Tuta biblioteko en unu libro!



El ĉiuj aperintaj volumoj en la Jubilea Kolekto de UEA, tiu ĉi – la kvina – plej bone prezentas la tutan lingvon, ĝian varion kaj fascinan.

Nova Esperanta Krestomatio

Redaktis William Auld.
509 p. Tole bindita kun kromkovrilo.
57,00 gld.; nur 38,00 gld. ekde 3 ekzempleroj.



La unua internacia junulara renkontiĝo en Rumanio!
Kluĵo, 19-25 julio 1992
Kontaktu: P.K. 1111, R-3400 Cluj-Napoca 1

Se vi deziras restadi en NICO, helpu al la kreado de **ESPERANTO-DOMO en NICO**

La donacitan monon vi uzos por pagi vian restadon en NICO po 100 FF por unu nokto kaj 1 aŭ 2 personoj.
Petu informilon ĉe: NICE-ESPERANTO. Hortensias 2
121 B. Bd NAPOLEON III. F.06200. NICE. Francujo.
Jam 15% de la necesa sumo estas anoncitaĵ.

KCE KULTURA
CENTRO
ESPERANTISTA

La Chaux-de-Fonds
SVISLANDO



Grava partaĵo de Esperantujo
Veni esperantigi • progresi • esperantumi • kongresi
Petu nian riĉan programon!
KCE, pl. 779, CH-2300 La Chaux-de-Fonds

“Juna estas tiu, kiu sentas sin tia...”



INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

03-09. de aŭgusto
u. Esztergom, Hungario
(tuj post la UK...)

Aliĝilon petu de: LINGVO-Studio, H-1675 Budapest, pk. 87, Hungario

Foje, pli utila ol pasporto

LA LISTO DE
GASTIGANTOJ DE
TEJO

1992



Ĉirkaŭ 900 gastigantoj
en 61 landoj

Mendu ĉe UEA: 18,00 gld. (triona rabato)

Inter pli ol 3300 titoloj ĉe la Libroservo de UEA, ne troveblas pli valora libro kontraŭ pli bagatela prezo!

Doña Bárbara


fama romano de famaj aŭtoro kaj tradukinto

“La traduko estas rara juvelo, de kiu ekzistas en nia literaturo tre malmulte da ekzemploj.”
(Waringhien)


“La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia traduka prozo...”
(Régulo Pérez)

“La traduko impresas minde klare kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en ‘La faraonoj.’”
(Vatré)

Doña Bárbara (1929), Rómulo Gallegos (1884-1969). El la hispana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm ISBN 84 399 2885 8. Prezo: 16,20 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj!



Ĉu vi ŝatas rustikan medion? Malkovru la vilaĝon IGGELEBACH, la koron de la naturparko “Pfelcer vald” (Palatinata Arbaro), en idilia germana valo! Meze de pinarboj, la gastejo “Haus Mühleck” (Esperante: “Domo Muela Angulo”) malfermas sin por Esperantujo. Ekskursu, konferencu kaj feriu ĉe Waldspeisegaststätte “Haus Mühleck”, IGGELEBACH, Am Mühleck, K 17, D-W-6738 Elmstein 2 (germanlingvaj informoj). Informoj en Esperanto ĉe Esperanto-Centro Humanismo, IGGELEBACH, Schlossgasse 30, D-W-6738 Elmstein 2.



Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuoj de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝupto,
Klaus Schubert, Humphrey Tonkin
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.
Individa abono: 54,00 gld. / US\$27,00
Institucia abono: 105,00 gld. / US\$ 52,50
Abonu pere de la Libroservo de UEA.